

EL POPOLO CINIO

中國報通

5

1978





**CELEBRADO DE LA FERMIGO DE LA KVINA
TUTLANDA POPOLA KONGRESO DE ĈINIO**







Popolaj re-
prezentantoj
laŭdataj de
la amasoj




Ĉen Lunfen (la unua dekstre), grupestrino de la tria laborejo de la Pekina Tria Radioaparata Fabriko, estas labora heroino de Pekino. Ŝi senĉese renovigis sian manipulan metodon kaj multe rapidigis la produktadon. En la pasinta majo ŝi plenumis laborkvanton de 75 tagoj en unu monato kaj en la pasintjara novembro jam antaŭplenumis la produktan taskon de la jaro 1978. Pro tio ŝi estas honore nomata homo iranta antaŭ la tempo.



Baŭ Venkuj estas maljuna agonomo en kulturado de tritikalo. En la komenca periodo post la Liberiĝo, li revenis entuziasmoplene al la patrolando por konstrui la novan Ĉinion. Post longtempa klopodo li sukcese kulturis specion de tritikalo (*Triticum triticale allo-octoploid*), kiu nun estas vaste kulturata en parto de la montregionoj de nia lando.

Duan Baŭceng (*la unua dekstre*) estas sekretario de la partia filio de Hinfeng-restoracio de Pekino, deveninta de veterana laboristo. Li ofte purigas la korton kaj ŝtuparon kaj surtabligas manĝaĵojn por klientoj kiel ordinara servanto. Pro tio li estas laŭdata de la kolegoj kaj klientoj.



Ĝaŭ Bingnan (*la unua dekstre*) estas fame konata kuracisto de la ĉina medicino. En la malnova socio la ĉinmedicinistoj estis neglektataj kaj la ĉinmedicina afero preskaŭ pereis. Hodiaŭ li tre emociiĝis pro tio ke li povas diskuti la ŝtatajn aferojn kune kun la ŝtataj gvidantoj. Li decidis senrezerve instrui al junuloj sian sperton akumulitan en la pasintaj kelkdek jaroj kaj kontribui sian forton por heredi kaj disvolvi la medicinon de la patrolando.


Solidara Kunveno

Printempo venis al Pekino kaj al la vasta tero de nia patrolando. La majesta Tiananmen-placo sin banis en sunbrilo kaj en la solena Popola Halo regis printempa atmosfero. En Pekino kolektiĝis reprezentantoj de la Kvina Tutlanda Popola Kongreso kaj la Kvina Tutlanda Komitato de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco venintaj de diversaj lokoj kaj diversaj frontoj de nia lando. La Popola Halo plenis de solidareco kaj venka ĝojo. La reprezentantoj decidis bataladi, sub la gvido de la saĝa gvidanto Prezidanto Hua kaj la Centra Komitato de la Partio, por konstrui nian landon en modernan socialisman potencon en la nuna jarcento, alte tenante la grandan standardon de Prezidanto Maŭ kaj tenante klasbatalon kiel la ĉefĉeneron por ordigi la landon.

Diversnaciecaj reprezentantoj ĝoje kunvenas en Pekino por interkonsiliĝi pri la ŝtataj aferoj.



Revolucia veterano He Ĉanggong (la dua de dekstre) kaj aliaj



Intervidiĝis reprezentantoj de la laboristoj de Daking-olekampo kaj la Anŝan-a Fera kaj Ŝtala Kompanio.





(De maldekstre) Kang Keking, Gaŭ Dan, Hie Binghin kaj Baj Jang



Intervidiĝis malnovaj agrikulturaj modeloj (de maldekstre) Sen Gilan, Lju Hongbin kaj Su Dianhuan.



Sciencistoj Ĉen Gingjun, Kian Sankiang (*la unua kaj kvara de maldekstre*) kaj reprezentantoj Bej Ŝiĝang kaj Mu King en interparolo

Ruĝarnea veterano Gan Zuĉang (*la dua de maldekstre*) kaj reprezentantoj de ĈPLA



EL POPOLA ĈINIO

中國報

1978

N-ro 5

(236)

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO

P.O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

Ĝenerala distribuanto: Guozi Shudian

P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

KOVRILO:

- P. 1. Celebrado de la okaziĝo
de la Kvina Tutlanda Popola
Kongreso de Ĉinio
- P. 4. Magnolio



Enhavo

La Unua Sesio de la Kvina Tutlanda Popola Kongreso	2
Nova longa marŝo	7
Demokratiaj rajtoj de la popolo garantiataj	11
Pri la Unua Sesio de la Kvina Tutlanda Komitato de ĈPPIK	15
Listo de la novaj gvidantoj de la Konstanta Komitato de KTPK, la Ŝtata Konsilantaro kaj la Kvina Tutlanda Komitato de ĈPPIK	21
Ĉiam en juneco	21
Esperantistoj en la Unua Sesio de la Kvina Tutlanda Komitato de ĈPPIK	24
Revoluciisto Ĉen Ji kaj liaj poemoj	25
Letero al Kamarado F. Rosenthal	28
Pri la meĥanizado de la ĉina agrikulturo	31
Ŝen Kjong kaj lia trovo de fruperioda ezofaga kancero	34
Vizito al longvivulo Ju Ŝengguang	36
Kanto de la juneco (Daŭrigo)	38
EN PEKINO: Tian-anmen-placo	41
AMIKECO: Vizito al Brita Sciencisto Doktoro Joseph Needham	44
EL ĈINA MODERNA HISTORIO: La moderniga movado de 1898	46
Esp-novajoj	46
KURANTAJ AFEROJ	23, 37, 48

La Unua Sesio de la Kvina



Prezidanto Hua Guofeng sur la podio



PRINTEMPO venas al Pekino, al la riveroj kaj la tero de nia patrolando.

La grandioza Tian-anmen-placo banas sin en brila sunlumo, kaj la giganta Popola Halo staras en floranta primavero.

De la 26-a de februaro ĝis la 5-a de marto, 1978, solene okazis en la Popola Halo la Unua Sesio de la Kvina Tutlanda Popola Kongreso kun granda historia signifo.

Tiu ĉi popola kongreso, kiu okazis unujare post la faligo de la kontraŭpartia "kvarpersona bando" de Vang Hongven, Ĝang Ĉunkiaŭ, Ĝiang

King kaj Jaŭ Venjuan, estis kunveno, kiu decidis la disvolvan vojon de nia socialisma patrolando. En la kunveno la 3497 reprezentantoj venintaj de la 30 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj kaj ĈPLA por praktiki la funkcion de la plej alta ŝtata organo, aŭskultis kaj ekzamenis la raporton pri la registara laboro, diskutis kaj adoptis la novan Konstitucion, elektis kaj decidis la gvidajn laborantojn de la ŝtato, ekzamenis la "Programon de la Dekjara Projekto por Disvolvi la Nacian Ekonomion 1976-1985" kaj diskutis la Nacian Himnon de la Ĉina Popola Respubliko.

Tutlanda Popola Kongreso



La kunvenejo

La elektitaj popolaj reprezentantoj havas vastan reprezentantecon. Inter ili 26.7% estas laboristoj, 20.6% kamparanoj, 14.4% ĈPLA-anoj, 13.4% revoluciaj kadroj, 15% intelektuloj, 8.9% patriotaj personoj, kaj 1% ĉinaj elmigrintoj jam revenintaj. Inter la reprezentantoj 21.2% estas virinoj, kaj 62.9% mezaĝuloj kaj junuloj. Kaj la pli ol 50 nacimalplimulto de la tuta lando havas siajn reprezentantojn, kiuj konsistigis 10.9% de la tuta reprezentantaro. Plejparto de la popolaj reprezentantoj estas labormodeloj, batalaj herooj kaj avangardaj laborantoj, kiuj faris bonegajn kontribuojn en la tri grandaj revoluciaj movadoj

de klasbatalo, produkta batalo kaj scienca eksperimentado.

Posttagmeze de la 26-a de februaro, la saĝa gvidanto Prezidanto Hua, kiel ĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro, faris al la kunveno raporton pri la registara laboro titolitan per “Unuiĝu kaj Klopodu por Konstrui Modernan Potencan Socialisman Landon”. En sia raporto, Ĉefministro Hua resumis la akrajn kaj komplikajn klasbatalon kaj batalon inter la du linioj dum la tri jaroj depost la Kvara Tutlanda Popola Kongreso de januaro, 1975. Li montris per forta voĉo, ke la



La plenumaj prezidantoj de la prezidantaro de la Kongreso Hua Guofeng, Je Gianjing, Deng Hiaŭping, Li Hiannian, Vang Donghing kaj Song Kingling sur la podio de la inaŭgura kunveno de la Unua Sesio de KTPK

faligo de la “kvarpersona bando” estis alia granda turniĝo de la revolucia historio de nia lando, kaj markis ke venke finiĝis la Unua Granda Proleta Kultura Revolucio de nia lando, kaj ke nia lando eniris novan disvolvan periodon de socialisma revolucio kaj socialisma konstruado. La ĝenerala tasko de tiu ĉi periodo estas konstrui nian landon en grandan potencon socialisman landon kun modernaj agrikulturo, industrio, nacidefendo, scienco kaj tekniko en la kuranta jarcento.

La 1-an de marto, K-do Je Gianjing, vicprezidanto de CK de KPC, faris, komisiite de CK de KPC, al la kongreso raporton pri la revizio de la Konstitucio. En sia raporto, Vicprezidanto Je montris, ke la reviziita Konstitucio, alte

tenante la grandan standardon de Prezidanto Maŭ, komplete kaj precize enkorpiĝis la doktrinon de Marks kaj Lenin pri la diktaturo de la proletaro, komplete kaj precize enkorpiĝis la doktrinon de Prezidanto Maŭ pri daŭrigo de la revolucio sub la diktaturo de la proletaro. Li emfazis, ke en la socialisma sistemo de nia lando la popolo estas la mastro de la ŝtato, kaj ĉiuj rajtoj de la ŝtato apartenas al la popolo. Li diris, ke ni devas plene disvolvi la socialisman demokration, kaj estas necese serioze praktiki demokratian administradon kun partopreno de popolamaso de ĉiu baza unuo. En sia raporto, Vicprezidanto Je indigne riproĉis la terurajn krimojn de la “kvarpersona bando”, kiu detruis la socialismajn leĝojn kaj ĉie tiranis. Li diris,

ke la “kvarpersona bando” detruis tiel demokration kiel centralizismon, tiel socialisman disciplinon kiel ŝtatan integrecon kaj popolan solidarecon. Kaj nun por elimini la venenan influon de la “kvarpersona bando”, ni devas forte restarigi kaj disvolvi la demokratian tradicion kaj batali kontraŭ ĉiu ajn faro, kiu detruas demokratian vivon kaj atencas civitanan rajton.

La raportoj de Ĉefministro Hua kaj Viceprezidanto Je esprimis la komunan deziron de la tutlanda popolo kaj ricevis varman subtenon de ĉiuj reprezentantoj.

Dum la periodo de la popola kongreso, ĉie, ĉu en la halo, ĉu en diversaj kunsidoj, regis atmosfero de ĝojo, solidareco kaj venko. Antaŭ pli ol unu jaro, kiam tiranis la “kvarpersona bando”, nigraj nuboj kovris la ĉielon de Ĉinio. Kiel peza kaj maltrankvila estis tiam la koro de la ĉina popolo! En tiu kriza momento, Kamarado Hua Guofeng kaj la Centra Komitato de la Partio en unu bato disrompis la “kvarpersonan bandon” kaj gvidis la tutlandan popolon en plenumado de la strategia politiko preni la klasbatalon kiel la ĉefĉeneron por ordigi la landon.

Post pli-ol-unujara klopodado, ni venigis nun la sunbrilan printempon. Ĉiuj reprezentantoj spertis ĉi tiun grandan historian turniĝon. Kiel iliaj pensoj povis ne ondiĝi hodiaŭ dum la kuna interkonsiliĝo pri la ŝtataj aferoj en la Popola Halo...

Prezidanto Hua Guofeng kaj Viceprezidanto Je Jianjing, Deng Hiaŭping, Li Hiannian kaj Vang Donghing, kiel ordinaraj popolaj reprezentantoj, partoprenis respektive en diskuta kunsido de sia elekta distrikto. Prezidanto Hua ĉeestis kunsidojn de ĉiu el la kvin grupoj de la pekina delegacio. Iuj reprezentantoj iam almozpmetis aŭ kolektis karborestaĵon en la malnova socio kaj fariĝis laborherooj kaj produktaj modeloj post la Liberigo. Kiam ili vidis, ke Prezidanto Hua afable kaj kun serena rideto sidis kune kun ili ĉe la sama tablo kaj interkonsiliĝis kun ili pri ŝtataj aferoj, ilia voĉo interrompiĝis pro emociiĝo. Iuj blankharaj sciencistoj, literaturistoj kaj dramistoj, kiuj estis traktataj kiel “malamiĝoj” multjare sub la diktaturo de la “kvarpersona bando”, eklarmis, kiam Prezidanto Hua afable ilin demandis: “Kiel vi fartas?”

Pekinaj popolamasoj manifestacias por celebri la kunvokiĝon de KTPK.





Popolanoj kaj armeanoj manifestacias por celebrado kaj firma subteno de la nova Konstitucio kaj la rezolucioj aprobitaj de KTPK.

La 5-a de marto, 1978 estis historia tago ege emocia. En tiu tago la Unua Sesio de la Kvina Tutlanda Popola Kongreso havis sian lastan ĝeneralan kunvenon. En la Popola Halo brile iluminita tondris ĝojkrioj. En tiu solena kaj ĝoja atmosfero, en sinsekvaj manklakaj ŝtormoj, la kunveno aprobis la novan Konstitucion de Ĉinio por la nova disvolva periodo, adoptis la rezolucion pri la raporto pri la registara laboro, elektis Je Jianjing kiel prezidanton de la Konstanta Komitato de la Kvina Tutlanda Popola Kongreso, decidis nomumi Hua Guofeng kiel ĉefministron de la Ŝtata Konsilantaro laŭ la propono de CK de KPC, nomumis aliajn ŝtatajn gvidantojn kaj aprobis la Nacian Himnon de nia lando. La unuanima voĉdonado kaj la kortuŝa manklakado esprimis la elkoran deziron de la 800-miliona ĉina popolo.

En Pekino, Ŝanhajo, Tiangin, Ŝenjang, Huhehoto, Urumĉi, Kunming, Ĉengdu, Vuhan, Kan-

tono, Lasao kaj aliaj urboj kaj tra la vasta kamparo de nia patrolando, la popolanoj kun senkompara ĝojo okazigis grandiozan manifestacion en la nokto de la 5-a kaj la tago de la 6-a de marto, por varme celebri la fermiĝon de la Unua Sesio de la Kvina Tutlanda Popola Kongreso. Oni eksplodigis petardojn, tamtamis, tamburis, stilziris kaj dancis drakan dancon kaj Janggo-dancon por plene esprimi sian ĝojegon. Ankaŭ en diversaj nacimalplimultaj lokoj, oni dronis en ĝojego. En Kunming, la floranta printempa urbo, diversaj nacimalplimultoj en festaj vestoj tamtamis kaj tamburis, kaj dancis leonan dancon. Kunportante la portretojn de Prezidanto Maŭ kaj Prezidanto Hua, la nacimalplimultoj de la Aba-a Tibet-nacieca Aŭtonoma Subprovinco de Siĉuan celebre manifestaciis sur la monta vojeto irita de la Ruĝa Armeo siatempe dum la Longa Marŝo. La paŝtistoj sur la stepo de la Interna Mongolio celebre kunvenis vespere de la 5-a de marto bruligante kampofajrojn.

JU FANG:

Nova longa marŝo

EN la tridekaj jaroj de la 20-a jarcento, sub la komando de Prezidanto Maŭ Zedong, la Ĉina Laborista-Kampana Ruĝa Armeo faris la Longan Marŝon de 25,000 lioj, kiu skuis la tutan mondon. Ĝi, kiel granda epopeo de revolucia heroismo de la ĉina popolo, estis registrita en la historio.


Hodiaŭ, en la nova periodo de socialisma revolucio kaj socialisma konstruado, sub la komando de Prezidanto Hua Guofeng la okcentmilion-a ĉina popolo komencis novan longan marŝon: efektiviĝi la modernigon de agrikulturo, industrio, nacidefendo kaj scienco kaj tekniko en Ĉinio en malpli ol kvarona jarcento. Tio estas granda afero en la historio de Ĉinio kaj ankaŭ de la mondo.

Efektivigo de la kvar modernigoj estas afero postlasita de Prezidanto Maŭ kaj Ĉefministro Ĝoŭ kaj ankaŭ forta deziro de la ĉina popolo. La ĉina popolo neniam forgesos la historion de pli ol cent jaroj post la Opia Milito de 1840, ke la patrolando suferis, pro la putriĝo de la socia sistemo kaj la postiĝinteco de la ekonomio kaj teknikoj, agresadon de imperiismaj potencoj kaj la popolo tretadon de iliaj ferhufoj. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, la ĉina popolo forte deziras, ke la patrolando forskuu de si la malriĉecon kaj postiĝintecon sub la gvido de la Kompartio kaj aperu sur la mondo kun tute nova prospera fizionomio. Antaŭ tri jaroj, laŭ instrukcio de Prezidanto Maŭ Zedong, Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj elmetis, en la Kvara Tutlanda Popola Kongreso, la grandiozan celon de efektivigo de la

kvar modernigoj en la kuranta jarcento. Kiel nia popolo ĝojis pro tio!

Sed, la “kvarpersona bando” de Vang Hongven, Ĝang Ĉunkiaŭ, Ĝiang King kaj Jaŭ Venjuan kun kontraŭrevolucia celo uzurpi la gvidantecon de la Partio kaj ŝtato kalumniis, ke la konstruo de socialisma moderna potenco estis “kapitalismigo”, persekutis la kadrojn kaj amasojn, kiuj persistis en energia produktado, kaj subfosis la

Ĉen Ĝinŝeng (en la fronto), estro de la Martin-fornejoj de la Tria Afinacia Fabriko de la Anŝan-a Fera kaj Stala Kompanio, manipulas kune kun laboristoj.






Gaū Gonghiu, estro de la Tritika Fako de la Ninghia-a Agronomia Instituto, en laboro



La matematika profesoro de Fudan-universitato de Sanhajo Su Buking inter esploraj studentoj

La fame konata pianisto Liu Sikun (la unua de maldekstre) en kunsido



socialisman konstruadon. De 1974 ĝis 1976, rezulte de tio la ŝtato perdis produktovaloron de industrio de ĉ. cent miliardoj da juanoj, ŝtalan produktokvanton de 28 milionoj da tunoj kaj financon enspezon de 40 miliardoj da juanoj. La tuta nacia ekonomio preskaŭ venis al la rando de bankroto.

Frakasiĝis la “kvarpersona bando”, kiu estis la plej granda obstaklo sur nia antaŭenmarŝa vojo. En 1977, la unua jaro post kiam Prezidanto Hua elmetis strategian principon teni klasbatalon kiel la ĉefĉeneron por ordigi la landon, ĉiuj flankoj de nia nacia ekonomio havis progreson kaj, ne nur la situacio de produkta stagno kaj eĉ regreso estis ŝanĝita, sed ankaŭ aperis nova impeta situacio. La produktovaloro de industrio pliiĝis je 14% kompare kun tiu de 1976. La metalurgia industrio, kiu longtempe suferis subfosadon de la “kvarpersona bando”, havis rapidan progreson, la produktokvanto de ŝtalo kreskis je 15.89% kompare kun tiu de 1976 kaj estis antaŭdate plenumita la jara produkta plano de ŝtalo. Kvankam agrikultura produkto suferis seriozan naturan katastrofon de sekeco, inundo, fiinsektoj k.a., tamen ĝi ankoraŭ akiris kompare bonan rikolton. Informoj pri riĉa rikolto de greno alvenis de la provinco Siĉuan konata kiel la “Lando de Abundeco”, la provinco Hejlongjiang konata kiel la “Nordorienta Grenejo” kaj la provincoj Gilin kaj Gujĝoŭ. La produktokvantoj de kotono, teo, juto, tabako k.a. ĉiuj pliiĝis kompare kun tiuj en 1976. En la lastaj vintro kaj printempo, oni disvolvis, en la tuta lando, grandskalan akvoutiligan konstruadon de kampoj. Komerco prosperis ĉu en urboj aŭ en kamparo. La financa enspezo kreskis multe kaj superis la elspezon. 60% de la oficistoj kaj laboristoj ricevis altigitan salajron. Ĉio ĉi tio kreis bonan komencon por nova disvolviĝo de socialisma afero de nia lando.

La kvar modernigoj, kiuj estis multe kalumniitaj de la “kvarpersona bando”, denove estis metitaj en la tagordon. En la Dekunua Tutlanda Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio okazigita en aŭgusto de la lasta jaro, la kvar modernigoj estis difinitaj kiel la ĝenerala tasko de la ĉina popolo en la nova periodo. Krome,

la kvar modernigoj estis skribitaj en la antaŭparolo de la nova konstitucio aprobata de la Kvina Tutlanda Popola Kongreso kaj certigitaj en leĝa formo. En sia raporto pri la laboro de la registaro Ĉefministro Hua Guofeng plenumplekse kaj sisteme prezentis taskojn, principon, politikojn kaj metodojn por konstrui socialisman modernan potencon kaj emfaze eksplikis la planon por disvolvi la nacian ekonomion en la ŝlosilaj dek jaroj de 1976 ĝis 1985.

Kiujn taskojn Ĉinio havas por disvolvo de la nacia ekonomio laŭ la dekjara plano?

Ĝis la jaro 1985, la produktokvanto de greno devos atingi kvarcent milionojn da tunoj, kaj tiu de ŝtalo sesdek milionojn da tunoj. De 1978 ĝis 1985, la totala produktovalorado de agrikulturo ĉiujare devos pliiĝi je 4-5%, kaj tiu de industrio je pli ol 10%. En tiuj ok jaroj, la nove pliiĝitaj produktokvantoj de la ĉefaj industriaj produktajoj multe superos tiujn en la pasintaj 28 jaroj, kaj la ŝtataj financa enspezo kaj investo al fundamenta konstruado egalos la totalajn sumojn de la pasintaj 28 jaroj.

En tiu ĉi periodo, stabila agrikultura fundamento devos esti metita, kaj 85% de la ĉefaj agrikulturaj laboroj devos esti plenumitaj per maŝinoj. La fundamenta konstruado de kampoj kun reformo de grundo kaj akvoutiligo kiel la

centro devos esti vaste farita, por ke ĉiu el la agrikulturaj loĝantoj havu 1/15 hektaron da kampo certiganta stabilan kaj altan produkton ĉu en sekeco aŭ en inundo. La ŝtato devos bone entrepreni la 12 grandajn bazlokojn de komercaj grenoj kaj konstrui nombron da bazlokoj de kotono, oleo, sukero, paŝtado kaj fiŝado, por ke niaj agrikulturo, forstumado, paŝtado, flankokupoj kaj fiŝado atingu kompare altan nivelon.

La ŝtato devos starigi malpezan industrion, kiu povas liveri ĉiam pli multe, laŭ po-kapa konsumado, da bonkvalitaj kaj malmulte-kostaj varoj.

La ŝtato devos plifortigi fundamentan industrion, konstrui kaj kompletigi 120 grandtipajn projektojn, inkluzive de dek grandaj feraj kaj ŝtalaj bazoj, naŭ bazoj de neferaj metaloj, ok karbaj bazoj, dek petrolaj kaj gasaj kampoj, tridek elektraj stacioj, ses novaj trunkaj fervojoj kaj kvin gravaj havenoj. Post sia finkonstruigo la 120 projektoj havos decidan signifon en ŝanĝo de postiginta fizionomio de la fundamenta industrio de nia lando.

La ŝtato devos starigi retojn de trafiko, poŝto kaj telekomuniko konformajn al la bezonoj en disvolvo de industrio kaj agrikulturo, fundamente efektivigi ĝeneralan uzon de elektraj kaj dizelaj lokomotivoj kaj akiri kompare grandan disvolviĝon en la ŝosea, rivera, mara kaj aviada trafiko.



Hua Luogeng (en la mezo), fame konata matematikisto, interparolas kun reprezentantoj de industria fronto.

Post finkonstruo de la sendependaj, kompare kompletaj industria sistemo kaj naciekonomia sistemo de nia lando, formiĝos fundamente ekonomia sistemo de ses grandaj regionoj de la Sudokcidento, la Nordokcidento, suda Ĉinio, orienta Ĉinio, norda Ĉinio kaj la Nordoriento, kaj la interna regiono fariĝos forta strategia postfronto.

La efektivigo de la dekjara plano multe ŝanĝos la ekonomian kaj teknikan nivelon de nia lando, multe plifortigos la materialan fundamenton kaj pretigos kondiĉojn por ke la nacia ekonomio de nia lando enviciĝu inter progresaj landoj de la mondo post klopodo de tri kvinjaraj planoj.

La bela perspektivo de la patrolando montrita en la raporto de Prezidanto Hua multe inspiras la reprezentantojn de KTPK kaj la centmilionan popolon de nia lando.

La Daking-anoj kaj Daĝaj-anoj, kiuj estas modeloj de la ĉina popolo en daŭrigo de la revolucio kaj penema luktado en la malfaciloj, decidis fari novajn kontribuojn en la nova longa marŝo de efektivigo de la kvar modernigoj. Re-representanto de Daking Ĝoŭ Ĝan-aŭ diris: "Ni devas fari konstruadon de la dek grandaj olekampoj kun la spirito de la Daking-anoj, por ke petrolo de la patrolando torentu kiel rivero." Re-representanto de Daĝaj Guo Fenglian diris: "Ni nepre diligente lernos modernajn sciencojn kaj teknikon, timante nenian malfacilon, por konstrui Daĝaj en novan modernan socialisman kamparon." La aliaj reprezentantoj de laboristoj kaj kamparanoj varme esprimis, ke ili nepre lernos de Daking-anoj kaj Daĝaj-anoj por fariĝi ĉeffortoj en la nova longa marŝo.

La reprezentantoj de Ŝanhajo diris: En la periodo de la tria kvinjara plano, la totala industria produktovalorado de Ŝanhajo ĉiujare pliiĝis je pli ol 10%. Pro subfosado de la "kvarpersona bando", la rapideco de la kresko de 1974 ĝis 1976 multe malleviĝis. Post faligo de la "kvarpersona bando", ĝia totala industria produktovalorado denove komencis leviĝi en 1977. En januaro de la kuranta jaro, la ŝanhaja laborista klaso klarionis al la nova longa marŝo per pliigo de la totala industria produktovalorado je 30% kompare

kun la plej alta nivelo de la sama periodo en la historio. Ili esprimis, ke en efektivigo de la kvar modernigoj la industria bazloko Ŝanhajo absolute ne vanigos la esperon de la popolo.

En la komenco de la nova longa marŝo, estis tre emociaj pli ol 200 ruĝarmeaj veteranoj ĉeestantaj la kongreson, kiuj spertis la Longan Marŝon de 25,000 lioj. Zeng Ĝaŭlin spertinta multajn batalojn rememoris sian pasintan travivaĵon en la Longa Marŝo. Antaŭ la batalo de la Louŝanguan-a pasejo, la 16-jara Zeng Ĝaŭlin renkontis sian patron en militiro kaj ili tuj iris al la batalo post hasta interŝanĝo de kelkaj vortoj. Poste, lia patro martiriĝis en trapaso de la marĉoza herbejo. Zeng Ĝaŭlin pensis en si, ke li nepre heredigos la revolucionan spiriton de la Longa Marŝo al la junaj batalantoj de siaj trupoj kaj siaj gefiloj por ke ili diligente lernu teknikon kaj fariĝu veraj revoluciuloj en la nova longa marŝo.

Ankaŭ la sciencistoj estas plenaj de ekscitiĝo. Ili diris: En sia raporto Prezidanto Hua alte taksis la intelektulojn, ni do nepre devas kontribui ĉiujn niajn fortojn por efektivigi la kvar modernigojn de la patrolando. Aŭskultinte la raporton pri la registara laboro, la fame konata matematikisto Hua Luogeng tuj verkis artikolon, kiu traktis la favorajn kondiĉojn de nia lando en puŝado de la scienca kaj teknika aferoj al la avangarda nivelo de la mondo. Li esprimis, ke li unuflanke sendos sciencajn sciojn al laboristoj kaj kamparanoj kaj faros pli profundan sciencon esploron, kaj aliflanke kulturos gejunulojn, por ke ili faru pli grandan kontribuon.

Nun, la tuta lando zorgas pri la nova longa marŝo. Oni diris: En la pasinta Longa Marŝo estis multaj malfaciloj, sed ili ne povis bari antaŭenmarŝon de la heroaj ruĝarmeanoj. Hodiaŭ, ni havas avantaĝan socialisman sistemon, naturajn riĉfontojn, la materialan fundamenton akumultitan en konstruado de la pasintaj pli ol 20 jaroj, gvidon de la Centra Komitato de la Partio kun Prezidanto Hua kiel la ĉefo kaj centmilionan popolon kun ekstreme granda socialisma aktiveco. Kia forto povas bari nin venke antaŭenmarŝi al la jaro 2000?

Demokratiaj rajtoj de la popolo garantiataj

EN la multe atentata Kvina Tutlanda Popola Kongreso de Ĉinio, Je Jianjing, vicprezidanto de la Centra Komitato de KPC, unu el la marŝaloj de la ĉina armeo kaj la nuna prezidanto de la Konstanta Komitato de la Kongreso, faris raporton pri revizio de la Konstitucio.

En tiu momento miloj kaj miloj da homoj estis aŭskultantaj lian raporton ĉe televidiloj aŭ radioriceviloj.

La grandaĝa Vicprezidanto Je estas blankhara kaj majesta. Kiam li parolis pri la ĝenerala tasko de la ĉina popolo en la nova periodo “konstrui nian landon en grandan socialisman potencon kun modernaj agrikulturo, industrio, nacidefendo, scienco kaj tekniko en la nuna jarcento”, lia voĉo tremadis kaj eĉ paŭzis momenton. Estis evidente, ke li detenis sian emocion. La kunvenantaj reprezentantoj kaj la radioaŭskultantoj kaj televidaj rigardantoj forte kortuŝiĝis de tio.

Prezidanto Hua Guofeng en kunsido de grupo



Kiu ne emociiĝis de la grandioza bluplano leĝe difinita!

Por efektiviĝi la ĝeneralan taskon de la nova periodo, oni devas movi la socialisman aktivecon de la diversnacieca popolo de la tuta lando kaj plene disvolvi socialisman demokration. Li diris: "Sub la socialisma reĝimo de nia lando la popolo estas la mastro de la ŝtato. Nia socialisma demokratio estas demokratio por vere garantii la mastrecon de la popolo." Ĉi tie Vicprezidanto Je citis la instruon de Prezidanto Maŭ Zedong: La popolo nepre devas havi rajton administri la superstrukturon. Ni ne devas kompreni la rajtojn de la popolo nur kiel tiujn de laboro, edukiĝo, asekuro ktp. sub alies administrado. Prezidanto Maŭ ankaŭ diris: La rajto de laboruloj administri la ŝtaton, diversajn entreprenojn, kulturon kaj edukon estas ilia plej granda kaj fundamenta rajto sub la socialisma reĝimo. Sen tiu rajto oni ne povas havi rajton de laboro, edukiĝo, ripozo kaj aliaj. Pro tio, en la nova konstitucio estas aldonita jena artikolo: "La ŝtato persistas en socialisma demokratia principo kaj garantias al la popolo partoprenon en administrado de la ŝtato, diversaj ekonomiaj kaj

kulturaj aferoj kaj en supervidado de la ŝtataj institucioj kaj iliaj laborantoj."

Tion aŭdinte oni ne povis ne rememori la dolorplenan tempon de terora regado de la "kvarpersona bando". Tiam, en iuj regionoj kaj institucioj strikte regataj de ĝi aĉuloj tiranis honestulojn, la nebone reformitaj bienuloj, kulkaj kaj kontraŭrevoluciuloj kruele persekutis revoluciajn amasojn kaj kadrojn eĉ aplikante rimedojn de diktaturo. Ĉio ĉi tio serioze atencis la socialisman leĝon, senigis al la popolo la demokratiajn rajtojn kaj atencis eĉ la personan sekurecon.

Ĝu Ginduo, juna instruisto de la Ŝanhaja Jueju-opera Trupo, estis jetita de la bando en malliberejon nur pro tio, ke li trifoje skribis, de julio de 1973 ĝis aŭgusto de 1975, leterojn al Prezidanto Maŭ kaj la Centra Komitato de la Partio por malkaŝi la kontraŭpartiajn krimojn de Ĝang Ĉunkiaŭ kaj Giang King.

En siaj leteroj li malkaŝis, ke Kuomintang-spiono Ĝang Ĉunkiaŭ kalumniis Vicĉefministron Ĉen Ji kaj aliajn gvidantojn de la maljuna revolucia generacio antaŭ la ŝanhaja publiko sen

Popolaj reprezentantoj en diskutado pri la raporto de Vicprezidanto Je pri revizio de la Konstitucio kaj la projekto de la reviziita Konstitucio



sciigo al Prezidanto Maŭ Zedong kaj la Centra Komitato de la Partio. Pri tio li prezentis sian opinion. Krome, sur la kovertoj estis klare skribitaj lia nomo kaj la adreso de liaj loĝejoj kaj institucio. Ĉio, kion li skribis, estas faktoj. Lia faro estis ja honesta kaj permesata de la partia statuto kaj la ŝtata konstitucio.

Sed kiu atendis, ke la demokratiaj rajtoj kaj persona sekureco de Ĝu Ginduo estis atencitaj de la bando kaj li estis enkarcerigita. La bando devigis lin konfesi, ke la skribitaj leteroj malice atakis "kamaradojn de la Centra Komitato de la Partio", kulpigis lin kiel kontraŭrevoluciulon kaj ankaŭ liaj kolegoj estis severe ekzamenitaj. Tiel senskrupule ili tretis la ŝtatan leĝon.

Kiom oni sopiris restarigi kaj defendi la dignon de leĝo! Tuj post la falo de la "kvarpersona bando", kamarado Ĝu Ginduo estis senkulpigita kaj liberigita.

La reviziita Konstitucio elmetis rigorajn postulojn al la ŝtataj institucioj kaj iliaj laborantoj. Unu el la fundamentaj postuloj estas kompakta ligiĝo kun la popolamasoj. Tio estis konstanta instruo de Prezidanto Maŭ Zedong. En tio Ĉef-

ministro Ĝou Enlaj donis al ni brilan ekzemplon de tutkora servado al la popolo.

Vicprezidanto Je Jianjing diris: "Ĉiuj bonvo-laj kritikoj de la bazaj unuoj kaj popolamasoj devas esti varme bonvenigataj. La rajto de popolamasoj malkaŝi malbonulojn kaj fiagojn aperintajn en la ŝtataj institucioj devas esti garantiata." Li draste kritikis tiujn laborantojn kiuj malobservis la amasan linion en kiu ĉiam persistis Prezidanto Maŭ, pro venena influo de la bando kaj nebona reformado de sia mondkoncepto. Iuj laborantoj eĉ vivis senfare kaj diboĉe kaj ĉasis profiton per siaj rango kaj potenco. Ili tute ne zorgas pri la interesoj de la popolamasoj.

La malbonaj influoj de la "kvarpersona bando" estas vastaj kaj profundaj, tial oni devas fari longan klopodadon por ilin forigi. Antaŭ nelonge okazis kazo, ke la kompartia sekretario de Guĉeng-gubernio Ma Lianbaŭ subfosis la eniran ekzamenon de altaj lernejoj. En februaro la partia komitato de Hengŝuj-subprovinco de Hebej-provinco severe punis la kulpulojn. Tio ricevis aprobon kaj aklamon de la popolamasoj.

Dum la ekzamenado Ma Lianbaŭ kaj aliaj gvidantoj de la nomita gubernio faris kontraŭle-

Reprezentantoj de Tibeto kaj Hingiang ĝoje intervidiĝas.



ĝajn aktivadojn en koluzio kun siaj sekvantoj. Ili intencis pasigi, per la potenco tenata en sia mano, siajn gefilojn kun malbonaj poentoj tra la ekzameno de altaj lernejoj. Tio kaŭzis haoson al la ekzamenejo, serioze konfuzis la laboron kaj vekis grandan indignon de la popolamasoj. Ili skribis al la Centra Komitato de la Partio kaj koncerna institucio de la provinco, por malkaŝi iliajn krimojn. La ŝtato tre atentis tiun aferon kaj senindulge punis la kulpulojn. Oni eksigis la ĉefkulpulojn de la en- kaj eksterpartiaj oficioj kaj pelis ilin el la Partio. Krome ilia kazo estis publikigita en ĵurnaloj por levi la justajn opiniojn kaj defendi la ŝtatan leĝon, kaj tio ricevis subtenon de la vastaj popolamasoj.



Sanhajaj reprezentantoj (de maldekstre) Jong Jijen, Ba Ĝin kaj Liu Nianĝi en interparolo

Nun, la demokratiaj rajtoj de la popolo leĝe difinitaj en la nova Konstitucio estas jam praktikataj. La persona libereco, la demokratiaj rajtoj kaj leĝaj ekonomiaj interesoj de la civitanoj determinitaj en la konstitucio estas konkrete garantiataj. La digno de la leĝo estas restarigita.

Vicprezidanto Je Gianĵing diris, ke ni devas starigi bonan ordon de stabileco kaj solidareco necesan por fari revolucion, produktadon, laboron kaj lernadon en ĉiuj fabrikoj, vilaĝoj, lernejoj, trupoj kaj institucioj, por ke la kadroj kaj vastaj popolamasoj povu fari sian plej grandan kontribuon al la socialisma afero en la atmosfero de solidareco, streĉiteco, seriozeco kaj vigeleco.

Finante sian raporton li diris: “Post 23 jaroj ni enpaŝos la sojlon de la 21-a jarcento. Vidu, kian fizionomion tiam havos nia socialisma patrolando! Ni ĉiuj tra la tuta lando, unuanime klopodu por venki la malfacilojn kaj malamikojn, konstruu nian landon en grandan socialisman modernan potencon kaj marŝu antaŭen al la granda celo — komunismo.”

Kvazaŭ granda fluo de varmo kaj forto lia parolado vibrigas la koron de milionoj kaj milionoj da popolanoj. Ĝi multe junigas la maljunulojn kaj plientuziasmigas la junulojn. Nun ĉiuj popolanoj klopodas por antaŭenmarŝi al la brila perspektivo!

Komitatanoj de ĈPPIK balotas por elekti prezidanton, vicprezidantojn, ĝeneralan sekretarion kaj membrojn de la Konstanta Komitato de la Kvina Tutlanda Komitato de ĈPPIK.



Pri la Unua Sesio de la Kvina Tutlanda Komitato de ĈPPIK

LA Unua Sesio de la Kvina Tutlanda Komitato de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco solene okazis de la 24-a de februaro ĝis la 8-a de marto de la kuranta jaro en Pekino. Dum la kunvenado la komitatanoj ĝoje kaj senĝene eldiris siajn opiniojn kaj interkonsiliĝis pri la ŝtataj aferoj.

La Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco estas organizo de la Popola Demokratia Unueca Fronto de nia lando kaj ludas gravan rolon en politika vivo de la ĉina popolo. La sesio de la Unua Tutlanda Komitato de ĈPPIK okazigita en septembro de 1949, plenumante la funkcion de la Tutlanda Popola Kongreso, deklaris la fondiĝon de la Ĉina Popola Respubliko kaj aprobis la Komunan Programon de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco, kiu servis kiel provizora konstitucio de la Ĉina Popola Respubliko, elektis la grandan gvidanton Maŭ Zedong kiel prezidanton de la Centra Popola Registaro, difinis la nacian standardon, ĉefurbon kaj nacian himnon kaj decidis la kronologian eraon. Ĝi estis kunveno de granda unuiĝo de la popoloj de ĉiuj naciecoj de la tuta lando.

La sesio proklamis malfermiĝon de nova epoko en la ĉina historio.

Post la Unua Plena Sesio de ĈPPIK, nia lando okazigis la Unuan Sesion de la Unua Tutlanda Popola Kongreso en septembro de 1954, kiu fariĝis organo de la plej alta ŝtatpotenco. La sesio akceptis la Konstitucion de la Ĉina Popola Respubliko, kiu anstataŭis la Komunan Programon de ĈPPIK. En decembro de la sama jaro, la Unua Sesio de la Dua Tutlanda Komitato de ĈPPIK okazis en Pekino. Ĝi akceptis la statuton de ĈPPIK, kiu deklaris, ke la Plena Sesio de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco jam finis sian taskon plenumi funkcion de la Tutlanda Popola Kongreso, tamen ĝi daŭre ekzistos kiel organizo de la Popola Demokratia Unueca Fronto. La sesio elektis Maŭ Zedong kiel honoran prezidanton de la Dua Tutlanda Komitato de ĈPPIK, kaj Ĝoŭ Enlaj kiel ĝian prezidanton.

La Unua Sesio de la Kvina Tutlanda Komitato de ĈPPIK estis la unua kunveno de ĈPPIK post la Unua Sesio de la Kvara Tutlanda Komitato

de ĈPPIK okazigita antaŭ 13 jaroj. Inter la membroj de la konferenco troviĝis reprezentantoj de la Komunista Partio de Ĉinio; veteranaj kadroj batalantaj dum kelkdek jaroj sekvante Prezidanton Maŭ; reprezentantoj de ĉiuj patriotaj kaj demokratiaj partioj kaj personoj, kiuj longtempe kunlaboris kun KPC kaj faris kontribuon al la revolucia afero de la ĉina popolo; personoj de sciencaj kaj teknikaj, edukaj, kulturaj, higienaj kaj sportaj rondoj kontribuintaj al la socialisma konstruado; reprezentantoj de diversaj naciecoj de la tuta lando; reprezentantoj de laboristoj, kamparanoj, virinoj kaj gejunuloj; reprezentantoj de la samlandanoj el Tajvan kaj tiuj de Hongkongo kaj Aŭmen kaj de hejmmrevenintaj transmaraj ĉinoj kaj aliaj. La tuta membraro nombras sume 1988, je du trionoj pli multa ol tiu de la lasta kaj ĝia reprezentanteco estas senprecedence vasta. Tio plene spegulis la grandan unuiĝon de ĉiuj naciecoj kaj ĉiuj patriotaj fortoj de la tuta lando sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio, post frakaso de la "kvarpersona bando" kaj plene manifestis la plian firmiĝon kaj disvolviĝon de la revolucia unueca fronto de nia lando kaj la prosperecon de nia socialisma afero.

Dum la dek tri tagoj de la kunvenado la membroj de la konferenco profunde karmemoris la grandan gvidanton kaj instruiston Prezidanton Maŭ, la fondinton de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco, kaj profunde karmemoris Ĉefministron Ĝoŭ Enlaj, kiu faris senmortan kontribuon por fondi kaj disvolvi la revolucion unuecan fronton. Multaj membroj kortuŝiĝis ĝis larmoj pensante, ke Prezidanto Maŭ prenis la revolucion unuecan fronton kiel unu el la gravaj armiloj por venki la malamikojn kaj laboris kiel prezidanto kaj honora prezidanto de ĈPPIK, kaj ke Ĉefministro Ĝoŭ elverŝis grandegan energion por firmigi kaj disvolvi la revolucion unuecan fronton.

La sesio resumis la laboron de la Kvara Tutlanda Komitato de ĈPPIK kaj serioze diskutis la novan statuton de ĈPPIK. Laŭ la ĝenerala tasko elmetita de la 11-a Tutlanda Kongreso de la Partio por la ĉina popolo en la nova periodo, la nova statuto de ĈPPIK difinis, ke la tasko de ĈPPIK estas plifortigi la grandan unuiĝon de ĉiuj naciecoj de la tuta lando, disvolvi la revolucion unuecan fronton, unuiĝi ĉiujn unuigeblajn fortojn, mobilizi ĉiujn aktivajn faktorojn kaj plejble turni negativajn faktorojn en pozitivajn




kaj klopodi por konstrui nian landon en grandan socialisman modernan potencon en la kuranta jarcento.

En la daŭro de la sesio, ĉiuj membroj de la Kvina Tutlanda Komitato de ĈPPIK ĉeestis, kiel observantoj, la Unuan Sesion de la Kvina Tutlanda Popola Kongreso, aŭskultis kaj diskutis la raporton de Ĉefministro Hua Guofeng pri la laboro de la registaro kaj la raporton de Vicprezidanto Je Jianjing pri la revizio de la Konstitucio, diskutis la projekton de la reviziita Konstitucio de la Ĉina Popola Respubliko kaj la skizon de la dekjara plano por disvolvo de la nacia ekonomio kaj unuanime aprobis tiujn raportojn kaj la novan Konstitucion. En la diskutado ĉiuj aktive prezentis siajn opiniojn, tio plene enkorpigis la spiriton de demokratia interkonsiliĝo de nia Partio.

En la unuaj tagoj de la sesio membroj de la konferenco per siaj propraj spertajoj kritikis la “kvarpersonan bandon” pri ilia inversigo de la rilatoj inter la malamikoj kaj ni kaj iliajn aliajn krimojn kaj prikantis la Centran Komitaton de la Partio estratan de Prezidanto Hua, kiu fra-

kasis la damnindan bandon kaj savis per tio la Partion kaj la ŝtaton.

Biologo Zoŭ Ĉenglu kaj lia edzino Li Lin, esplorantino de la Geomeĥanika Instituto estas membroj de ĈPPIK kaj ili ambaŭ ĉeestis la sesion. En 1975, kiam Kamarado Hu Jaŭbang (nun li estas estro de la Organiza Ministerio de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj respondeculo de la Alta Partia Lernejo de CK de KPC) venis labori en la Ĉina Akademio de Sciencoj, Zoŭ Ĉenglu skribis al li leteron, en kiu li proponis atenti la studadon pri molekula biologio. Estis neatendite, ke la “kvarpersono bando” persekutis lin pro la letero per diversaj kulpigoj. Post aŭskultado de la raporto de Ĉefministro Hua Guofeng pri la registara laboro, li denove emfazis gravecon de atento pri molekula biologio en la grupa kunveno de la sesio kaj proponis aldoni tion en la raporton de la registara laboro. Ĉefministro Hua ligiĝas kun la popolo koro kun koro kaj plenumis lian proponon. Li Lin estas filino de la fama geologo Li Siguang. Ŝi studas la teorion pri “mislokiĝo de kristal-latiso” kaj Li Siguang plurfoje proponis antaŭ sia morto, ke ŝi laboru en la Geo-



La prezidanto de la Kvina Tutlanda Komitato de ĈPPIK Kamarado Deng Hiaŭping en parolado

La kunvenejo



Ŝanhajaj komitatanoj de ĈPPIK

meĥanika Instituto, por ke ŝi ligu sian fakanscion kun studo de geomeĥaniko. Tamen en la tagoj, kiam tiranis la “kvarpersona bando”, ŝi ne nur ne povis plenumi la deziron de sia patro, sed eĉ multjare ne povis fari esploran laboron. Nun ŝia deziro jam realiĝis. Pensante tion, kiel ili povas ne danki Prezidanton Hua kaj la Centran Komitaton de la Partio! Ili ĝoje diris, ke

kvankam ili jam aĝas pli ol 50 jarojn, tamen ili certe plenergie klopodos por efektiviĝi modernigon de niaj agrikulturo, industrio, nacidefendo kaj scienco kaj tekniko. Zoŭ Ĉenglu estas ankoraŭ pli entuziasmigita. Li diris, ke li nepre enradikigos kaj florigos molekulanan biologion en la granda patrolando per ĉiuj siaj fortoj.

Komitatanoj de ĈPPIK de la Revolucia Komitato de la Ĉina Kuomintang en diskutado pri la raporto pri la laboro de la Konstanta Komitato de ĈPPIK





Senpartiaj patriotaj personoj en diskutado

En la kunveno, same kiel la geedzoj Zoŭ Ĉeng-lu kaj Li Lin, multaj membroj ne nur rememoris la pasintajojn, sed ankaŭ kun memfido donis grandan zorgon al la nova granda afero de la patrolando.

Kelkaj maljunaj membroj diris, ke kvankam ili jam maljuniĝis, tamen ili havas grandan ambicion kaj ne ĉesos batali dum ili vivos.

La fame konata ponto-specialisto Maŭ Jiŝeng ĝoje diris, ke la Centra Komitato de la Partio estrata de Prezidanto Hua daŭrigas postlasitan aferon de Prezidanto Maŭ kaj Ĉefministro Ĝoŭ kaj gvidas la ĉinan popolon en farado de ekstreme grandaj gloraj aferoj neniam faritaj de la antaŭuloj. Li juris al la saĝa gvidanto Prezidanto Hua, ke kiel maljuna soldato en la sciencaj kaj teknikaj rondoj li decideme plenumos ordonon antaŭenmarŝi al la kvar modernigoj kaj en siaj lastaj jaroj helpas la junan generacion unuflanke kaj brave grimpos altaĵojn de scienco kaj tekniko aliflanke.

Profesoro Vang Li de la Pekina Universitato sin okupas pri instruado jam pli ol 40 jarojn kaj liaj verkoj pri la ĉina klasika literaturo estas vaste atentata kaj konata. Kiam la "kvarpersona

bando" regis la universitaton, li ne kuraĝis malkaŝe fari studadon kaj skribi ion. Nun ne nur liaj malnovaj verkoj estas denove eldonitaj, sed ankaŭ liaj novaj verkoj estas aranĝitaj por publikigo. La maljuna profesoro faris por si kvinjaran planon pri verkado kaj studado kaj decidis kontribui siajn fortojn por levi altan tajdon de la socialisma kultura konstruado.


Grizhara matematikisto Vu Ven-gjun nun studas pri meĥanika teoremprovado. Dum ĉeestado de la konferenco li daŭre faris studon en libertempo. Ĉe lia kapkuseno kuŝis malgranda kalkulmaŝino kaj sur la lito estis referencaj libroj kaj kajeroj. Li diris kun plena memfido: "Post finiĝo de la sesio mi laboros pli energie por kiel eble plej frue elfari la unuan teoremprovan maŝinon de nia lando."

Ankaŭ Panĉen Erdeni ĉeestis la sesion de ĈPPIK.

En la grupa kunveno li faris paroladon. Li unue diris: "Mi tre emociiĝis pro tio, ke mi povas ĉeesti la sesion de ĈPPIK kaj ankaŭ la Tutlandan Popolan Kongreson kiel observanto. Mi devas aparte danki la saĝan gvidanton Prezidanton Hua kaj la Centran Komitaton de la



Komitatanoj de ĈPPIK devenintaj de ĉinaj elmigrintoj iam revenintaj kaj sportistoj



Panĉen Erdeni (maldekstre) kaj Burhan Sahibi

Partio pro ilia zorgo pri mi. Mi estas homo kulpa.”

Parolante pri siaj kulpoj li diris: “Mi tre indigniĝis kontraŭ mi mem, ke pro diversaj kialoj, precipe pro mia klasa naturo, mi faris grandajn krimojn kontraŭ la Partio, la popolo kaj socialismo kaj intrigis por perfidi la patrolandon. Kvankam mi ne fuĝis eksterlanden, tamen mi estas same kulpa kiel Dalaj laŭ mia krimo... Post malkaŝo de mia fiago, la granda gvidanto Prezidanto Maŭ ne punis min, sed multfoje min savis. La estimata Ĉefministro Ĝou plurfoje in-

terparolis kun mi kaj pacience min edukis. Sed mi ne akceptis iliajn admonojn. Nur post tio la Partio kaj la popolo senigis min je la ofico de vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso en 1964, tamen konservis al mi la oficon de membro de la Konstanta Komitato de la Kvara Tutlanda Komitato de ĈPPIK, ne konfiskis miajn posedaĵojn kaj min salajris kiel antaŭe. La kritiko de la registaro kaj la popolo kontraŭ mi estas tute justa, kaj tio estas postulata de la ŝtata intereso kaj de la tibeta popolo, kaj ankaŭ estas savo al mi.”

Panĉen diris: “Dank’ al politika studado kaj fakto de disvolviĝo de la konstruado de Tibeto, mi venis al jena konkludo: Tibeto havos brilan perspektivon, nur se ĝi estos unuigita en la granda nacieca familio de la Ĉina Popola Respubliko, kaj la tibeta popolo havos feliĉan estontecon, nur se ĝi persistos en firma defendo de la unueco de la patrolando kaj defendo de la granda unuigo de ĉiuj naciecoj kaj persistos en la socialisma vojo sub la gvido de la Kompartio. Por mi mem, la unika ĝusta vojo estas sincere penti pri la faritaj krimoj, tutkore akcepti gvidadon de la Komunista Partio de Ĉinio, iri la socialisman vojon kaj diligente servi al la popolo.”

Ŝou Ginven, vicestro kaj ĝenerala sekretario de la Ŝanhaja Komitato de la Ĉina Demokratia Ligo ĝoje diris, ke la ligo havas pli ol 2,500 membrojn en Ŝanhajo, inter kiuj multaj laboras en altaj lernejoj, sciencaj institutoj, hospitaloj kaj literaturaj kaj artaj unuoj kaj iuj el ili estas fame konataj sciencistoj kaj specialistoj. Ili ĉiuj decidis kontribui siajn saĝon kaj sciojn al la bela afero de moderniga konstruado de la patrolando en siaj lastaj jaroj.

La Unua Plena Sesio de la Kvina Tutlanda Komitato de ĈPPIK unuanime aprobis la “Statuton de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco” kaj la “Rezolucion de la Unua Plena Sesio de la Kvina Tutlanda Komitato de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco”, unuanime elektis Kamaradon Deng Hiaŭping kiel prezidanton de la Kvina Tutlanda Komitato de ĈPPIK kaj elektis ankaŭ ĝiajn vicprezidantojn, ĝeneralan sekretarion kaj membrojn de la Konstanta Komitato.

Listo de la novaj gvidantoj de la Konstanta Komitato de KTPK, la Ŝtata Konsilantaro kaj la Kvina Tutlanda Komitato de ĈPPIK

LA KONSTANTA KOMITATO DE KTPK

Prezidanto: Je Gianjing

Vicprezidantoj: Song Kingling (virino), Nie Jongĝen, Liu Boĉeng, Ulanfu, Vu De, Vej Guoking, Ĉen Jun, Guo Moĵuo, Tan Ĝenlin, Li Gingkjuan, Ĝang Dingĉeng, Ĉaj Ĉang (virino), Deng Jingĉaŭ (virino), Sajfudin, Liaŭ Ĉengĝi, Gi Pengfej, Ngapo Ngaŭang-Ĝigme, Ĝoŭ Gianĵen, Hju Deheng kaj Hu Gjueven

LA ŜTATA KONSILANTARO

Ĉefministro: Hua Guofeng

Vicĉefministroj: Deng Hiaŭping, Li Hiannian,

Hju Hiangkian, Gi Dengkuj, Ju Kiuli, Ĉen Hilian, Geng Biaŭ, Ĉen Jongguj, Fang Ji, Vang Ĝen, Gu Mu, Kang Ŝi-en kaj Ĉen Muhua (virino)

LA KVINA TUTLANDA KOMITATO DE ĈPPIK

Prezidanto: Deng Hiaŭping

Vicprezidantoj: Ulanfu, Vej Guoking, Peng Cong, Ĝaŭ Zijang, Guo Moĵuo, Song Ĵenkjong, Ŝen Janbing, Hju Deheng, Oŭjang Kin, Ŝi Liang (virino), Ĝu Junŝan, Kang Keking (virino), Gi Fang, Vang Ŝoŭdaŭ, Jang Gingĵen, Ĝang Cong, Pebala Gelieh-Namĝe, Ĝoŭ Gianĵen, Ĝuang Hijkjuan, Hu Zi-ang, Ĵong Jijen kaj Tong Diĝoŭ

Ĉiam en juneco


JEN maljuna sciencisto kun blankaj haroj ĉe la tempioj faras eksperimenton pri citogenetiko sub nigra sekca mikroskopo.

La objekto estas ĉelo de impregnita ovolo de orfiŝo. La sciencisto tenas ekstremojn de la ĉelo per ŝtalaj pinĉiletoj kaj delikate deŝiras ambaŭ flanken la ĉelan membranon kaj ĝin tute forigis. Poste li faras injekton al la senvestigita malgranda vivo per injektilo multe pli maldika ol kudrileto. En duona horo la sama operacio ripetigis 20-30 fojojn. Vere admirinda estas lia rapida, lerta kaj preciza manipulado. La sciencisto estas neniŭ alia ol Profesoro Tong Diĝoŭ, fama biologo de nia lando.

Profesoro Tong famiĝis pro studo de eksperimenta embriologio kaj faris malfacilan kaj deta-

lan esploradon pri leĝoj de biogenezo dum kelkdek jaroj. Li atingis elstaran sukceson precipe en esploro pri reciproka influado inter nukleo kaj citoplasmo kaj elmetis novan fakan opinion pri ĝi. En la lastaj jaroj li, kune kun usona sciencisto Profesoro Man-Chiang Niu, atingis novan sukceson en esploro de ĉelo kaj genetiko kaj faris novajn trovojn en studo pri fundamenta teorio de citogenetiko, kaj iliaj disertaĵoj altiris al si atenton de sciencaj rondoj en kaj ekster la lando.

Profesoro Tong ĝuas altan prestiĝon en sciencaj rondoj en kaj ekster la lando kaj estas respektata de la Partio kaj la popolo. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, li estas elektita kiel reprezentanto de ĉiuj Tutlandaj Popolaj Kongresoj kaj kiel membro de ĝia Konstanta Komitato, ekde la




Tong Diĝoŭ (dekstre) kaj Man-Chiang Niu, profesoro de la Biologia Fakultato de Temple-universitato de Filadelfio de Usono, kune faras sciencajn eksperimenton.

Tria Tutlanda Popola Kongreso. Ĉijare li estas elektita kiel vicprezidanto de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco kaj nomumita kiel vicestro de la Ĉina Akademio de Sciencoj.

Dum la intervjuo li diris al mi: “Kiel maljuna intelektulo deveninta de la malnova Ĉinio, mi havas malnovajn pensojn kaj kutimojn. Sed mi aprobas socialismon. La Partio kaj la popolo kredas kaj respektas min kaj donis al mi honoron partopreni en interkonsiliĝo pri ŝtataj aferoj. Samtempe ili kreis diversajn favorajn kondiĉojn por ke mi kreu novon kaj faru kontribuon en scienca esplorado.”

En siaj fruaj jaroj Profesoro Tong trapasis zigzagan vojon. “La ĉina popolo ne estas malsaĝa kaj ni devas glorigi nian nacion per sciencaj eltrovoj.” Kun tia ambicio la juna Tong Diĝoŭ iris en la socion antaŭ 40 jaroj, kiam li diplomitiĝis el la biologia fakultato de Fudan-universitato de Ŝanhajo. Sed en la putriĝinta malnova Ĉinio malprosperis la sciencaj rondoj kaj estis tute neeble realigi lian ambicion. Helpate de la parencoj kaj amikoj li veturis al Belgio por tie studi. Li lernis tre diligente kaj povis fari sub mikroskopo delikatan operacion nefareblan tiam por multaj kolegoj, kaj pro tio li estis laŭdata de



Unuvosta orfiŝo elkulturita de Tong Diĝoŭ kaj Man-Chiang Niu per scienca eksperimento. Sube maldekstre estas ordinara orfiŝo.

la lastaj. Li publikigis plurajn disertaĵojn, sukcese trapasis la ekzamenon kaj ricevis doktoran titolon.

Tong Diĝoŭ jam havis kondiĉojn por plua esplorado, tamen li ĉiam sopiris al sia patrolando. En 1934 li decideme revenis al sia patrujo kun forta deziro konstrui ĝin. En Ŝandong-universitato li kaj laboris kiel instruisto por sin vivteni kaj faris eksperimenton pri ĉela diferenciĝo. Post eksplodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito en 1937, li iris al Ĉongking kaj laboris tie kiel instruisto en Tonggi-universitato. Post la lecionhoroj li daŭre faris esploron pri citologio. Sed li havis nur kompatinde malmultajn ekipaĵojn. Pro manko de elektroprovizo li faris eksperimenton ekster la domo sub la sunlumo en printempo kaj somero, kaj eĉ en frosta vintro.

Post la Liberiĝo la popola registaro tre zorgis Profesoron Tong, kaj lia laboro surpasis novan vojon. Li estis nomumita kiel estro de la biologia fako de la Ĉina Akademio de Sciencoj kaj kumulis estron de la Mara Institucio de Kingdaŭ. Li ĉiam tenas sin kiel ordinara laboranto en la scienca kaj teknika fronto. Li sin okupas kaj pri studo de fundamentaj teorioj kaj pri praktiki-

kado. Lia studo pri rara mara fiŝo *Branchiostoma belcheri* plenigis unu blankon en biologio, per tio malkaŝis sekreton de evoluo de senvertebruloj al vertebruloj kaj lia sukceso estis rekonata internacie kaj akceptata en biologiaj lernolibroj eksterlande. La gravaj instrukcioj de Prezidanto Maŭ Zedong kaj Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj pri sciencoj kaj liaj praktikaj spertoj pliriĉigis lian mondkoncepton kaj fortigis lian deziron fari kontribuon al la patrolando.

La 76-jara Profesoro Tong ofte iras al la laboratorio je 1-2 horoj pli frue antaŭ la difinita dejorhoro. Orfiŝo ordinaro metas ovojn frumaten, kaj iom da malfruiĝo povas prokrastigi eksperimenton je unu tuta tago. Por fari multajn eksperimentojn samtempe kaj kontinue Profesoro Tong ofte devas sidi ĉe mikroskopo de la 7-a horo matene ĝis la 13-a aŭ 14-a horo posttagmeze, kaj iam li kaj liaj helpantoj en vatitaj vestoj persistis en eksperimentado en fridiga tenejo. Dum eksperimentado li ĉiam persone legas literaturon, kontrolas rezultojn kaj faras notojn. Li ofte ne povas ĝustatempe preni manĝojn kaj ripozi dimanĉe. Vidante, ke li malgrasiĝis pro laciĝo, liaj gefiloj admonis lin zorgi sian sanon kaj lasi konkretajn laborojn al aliaj. Tamen li ĉiam diris kapskuante: "Ni devas scii, ke la konstruado de socialismo dependas de ambaŭ manoj, sed ne de la buŝo. Ankaŭ aliaj estas same tre okupataj kiel mi."

En la komenco de 1976 forpasis Ĉefministro Ĝoŭ kaj pro tio dolore malĝojis Profesoro Tong Diĝoŭ. Tuj poste lia edzino Vicprofesoro Je Jufen, lia kunlaboranto en la afero kaj kunulino en la vivo, mortis pro kormalsano. Kiel granda malfeliĉo trafis la maljunan profesoron. Dank' al intima zorgado de la gvidantoj kaj kamaradoj, li eltenis tiun malĝojon kaj tuttage laboradis en laboratorio.

Profesoro Tong estas ne nur veterano de nia biologia rondo ĝuanta altan prestiĝon, sed ankaŭ liganto inter sciencistoj kaj la Partio. Li ofte prezentis dezirojn kaj postulojn de intelektuloj en diversaj kunvenoj. En la Unua Tutlanda Popola Kongreso li, en la nomo de la sciencistoj, montris decidon al la Partio: Socialismo devas havi siajn proprajn sciencajn kreaĵojn por rapide prosperigi la junan sciencon aferon de la nova Ĉinio. Laŭ la principo de Prezidanto Maŭ "Floru cent floroj kaj voĉojn donu cent skoloj" li kaj liaj kolegoj aktive disvolvas liberan diskutadon pri sciencoj kaj multe vigligis la sciencajn rondojn.

Je la fino de la intervjuo Profesoro Tong diris: "Kvankam mi jam aĝas pli ol 70 jarojn, mi ankoraŭ povos labori kelkajn jarojn."

Li decidis senlace klopodi por modernigi la agrikulturon, industrion, nacidifendon, sciencon kaj teknikon de la patrolando.



**VASTA APLIKO DE
ANTIBIOTIKOJ KONTRAŬ
PLANTAJ MALSANOJ KAJ
FIINSEKTOJ**

Poragrikulturaj antibiotikoj nun estas vaste uzataj en nia kamparo. Antibiotikoj produktitaj de mikroboj estas biologiaj insekticidoj. Ili havas bridan kaj mortigan efikon al iuj malsanoj kaj fiinsektoj de plantoj, estas pli sekuraj ol kemiaj insekticidoj en produktado kaj uzado kaj ne malpurigas la medion. La antibiotikoj estas efikaj en ekstermado de pli ol 20 specoj de malsanoj kaj fiinsektoj de grenaj, tropikaj kaj ekonomiaj plantoj, inkluzive de kotonaj kaj oleaj plantoj, teaj kaj fruktaj arboj kaj legomoj.

La eksperimentado kaj vasta uzado de poragrikulturaj antibiotikoj akcelis la disvolviĝon de nia agrikulturo. Ekzemple, sasakio (*Pellicularia sasakii*), unu el la tri gravaj malsanoj de rizplantoj, estas ĉefa minaco al la kreskado de rizplantoj. Ĝi povas malpliigi la produktokvanton de rizo je 10-20%. Giangsu, Guangdong kaj aliaj provincoj nun ĉefe uzas antibiotikon "Ginggang" kontraŭ tiu malsano kaj ricevis bonan efikon.

Esperantistoj en la Unua Sesio de la Kvina Tutlanda Komitato de ĈPPIK




ĈPPIK - komitatanoj-esperantistoj (de maldekstre) Huang Naj, Fang Sanging, Ĝiugi, Je Gjungian kaj Ĝin Kemu

Pluraj esperantistoj el diversaj rondoĵoj de nia lando estas membroj de la Kvina Tutlanda Komitato de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco. Inter ili troviĝas Hujucz, membro de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso de Ĉinio kaj prezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo, Je Lajŝi (Ĵelezo), vicprezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo, Ĝiugi (Orverda) kaj Je Gjungian (Cicio Mar), membroj de la Konstanta Konsilantaro de la Ĉina Esperanto-Ligo, Fang Sanging (Tikos), veterana esperantisto laboranta en la Redak-

cio de El Popola Ĉinio, Ĝin Kemu, profesoro de la Pekina Universitato, kaj Huang Naj, blinda esperantisto, kiu antaŭe laboris en la Ministerio por Internaj Aferoj. En la sesio ili ĝoje diskutis pri gravaj ŝtataj aferoj kune kun aliaj membroj. Krome kelkaj el ili havis agrablan revidiĝon post la falo de la "kvarpersona bando" kaj interŝanĝis opiniojn pri antaŭenpuŝado de ĉina esperanta movado profitante la okazon. Kvankam ili ĉiuj estas jam maljunaj, tamen ili restas oferemaj en esperantaj laboroj.



Granda Ŝanĝiĝo de Forstejo




Arbohakistoj

En la Granda Hing-an-montaro kreskas densaj arbaroj de larikoj, betuloj kaj aliaj. Ĝi estas unu el niaj plej grandaj arbaraj regionoj kaj konata kiel "Verda Trezorejo". Ĝia jara meznombrata temperaturo estas 20°C sub la nulo, la jara frosta periodo estas ok monatoj kaj la plej malalta temperaturo estas pli ol 50°C sub la nulo.

Pro malvarmeo kaj malfacila trafiko tiuj naturaj riĉfontoj estis neglektataj en la malnova Ĉinio.

En la komenco de vintro de 1964, laŭ la alvoko de Prezidanto Maŭ kaj la Centra Komitato de la Partio, trupoj de la Fervoja Armeo de ĈPLA kaj arbaristoj marŝis en la primitivan arbaran regionon kaj komencis grandskalan ekspluatadon. Granda ŝanĝiĝo okazis al tiu regiono. Fervojo penetris en la montaron kaj ŝoseoj konstruiĝis ĉie en la arbaroj kaj stariĝis grandaj, mezaj kaj malgrandaj fabrikoj. Aperis ankaŭ novaj vilaĝoj kaj urboj unuj post aliaj. La arbara regiono ĉiujare liveras al la ŝtato dekojn da milionoj da kubmetroj da ligno.



Trajno rapidas tra arbaro.




Patrolado supér la arboceano



Forigo de neĝo en neĝostormo



Transportado de
lignoj



Nove konstruita
urbo Giagedaĉi

Revoluciisto Ĉen Ji kaj liaj poemoj

EN la pasinta jaro, eldoniĝis “Elektitaj Poemoj de Ĉen Ji”, kies distribuo tra la tuta lando aperigis vere kortuŝajn scenojn de amasa aĉetado.

Malferminte la libron, oni vidas portreton de la aŭtoro sur la fronta paĝo kaj dorse de ĝi estas faksimilo de lia manskribita versaĵo:

*Sur verda pino plumbe pezas neĝo,
sed rekta l' pino staras kun fiero.
Por koni la noblecon de la pino,
atendu ĝis la tempo de degelo.*


Tio estas strofo el la poemo “Versoj de Vintraj Noktoj” skribita de la poeto en 1960. Tra pri-skribo de natura pejzaĝo, la versaĵo esprimas la noblecon de la poeto, kaj per simplaj vortoj ĝi montras profundan filozofian penson. Ĝi bildigas la batalan vivon de la poeto, kiu mem similis al giganta pino, kies volo estas neŝanĝebla de uraganoj kaj kies fideleco estas nedetruenda de neĝo.

Kamarado Ĉen Ji estis proleta revoluciisto de la malnova generacio, multe estimata kaj admirata de la ĉina popolo. En sia letero al aŭstra kuracisto F. Rosenthal en 1942 (vidu la tradukaĵon de ĝi sur p. 28), li koncize rakontis sian travivaĵon antaŭ la aĝo de 41 jaroj, kaj ĝi povas esti rigardata kiel mallonga aŭtobiografio pri la unua duono de lia vivo. Post kiam li laboris kiel aganta estro de la Nova Kvara Armeo, li vaste faris geriladon kontraŭ la japanaj agresantoj

en norda Giangsu kaj starigis tie kontraŭ-japanan demokratian regpotencon. Post la fino de la Kontraŭjapana Rezistmilito, la politika reprezentanto de la ĉinaj grandaj bienuloj kaj burĝoj Ĉiang Kajŝek senskrupule atakis la liberigitajn regionojn per ĉiuj siaj fortoj. Dum la Liberiga Milito, Kamarado Ĉen Ji laboris, en sinsekvaj periodoj, kiel komandanto de la Centraĉinia Kampa Armeo, la Orientaĉinia Kampa Armeo kaj la Tria Kampa Armeo, kaj sub lia gvido la armeo kaj popolo de la Liberigita Regiono de Orienta Ĉinio faris venkoplajn batalojn por la liberigo de la tuta lando.

Ĉu en la longa revolucia milito, aŭ en la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado, Kamarado Ĉen Ji persistadis en la proleta revolucia linio de Prezidanto Maŭ kaj faris elstaran kontribuon al la proleta revolucio.

En 1939, Gekamaradoj Ĉen Ji kaj Ĝang Kian en la komando de la Nova Kvara Armeo sude de Jangzi-rivero





Gekamaradoj Ĉen Ji kaj Ĝang Kian

En la 6-a de januaro, 1972, li mortis de intesta kancero. Prezidanto Maŭ alte taksis lian batalan vivon kaj persone ĉeestis la funebran kunvenon pri li, kaj Ĉefministro Ĝou Enlaj faris funebran paroladon en ĝi.

La "Elektitaj Poemoj de Ĉen Ji" estas redaktita de lia kunbatalantino kaj edzino Kamaradino Ĝang Kian, kun malĝojega koro pro la forpaso de Kamarado Ĉen, kaj en sufero de pulma kancero. En 1973, antaŭ ol la malsano forprenis ŝian vivon, ŝi finis la redaktadon kaj verkis antaŭparolon por la kolekto. La antaŭparolo pri-skribis la obstinan bataladon de Kamarado Ĉen Ji dum la tuta vivo por la revolucio, kaj lian aplomban sintenon en luktado kontraŭ la mal-

sano ĝis la lasta spiro. Post la forpaso de Kamarado Ĉen Ji, Kamaradino Ĝang Kian ricevis multajn kondolencajn leterojn kaj telegramojn, kaj multaj sendis al ŝi siajn funebrajn vortojn kaj versojn kaj varme petis, ke ŝi ordigu kaj eldonu la poemojn de Kamarado Ĉen Ji. Ŝi skribis en la antaŭparolo: "Ĝuste kiam min trafis sinsekvaj malfeliĉoj, ĉio tio forte stimulis kaj subtenis min kaj vigligis mian spiriton, ke mi ne dronis en la malĝojo nek submetiĝis al la minaco de la malsano. Mi decidis labori diligente ĝis la lasta spiro, same kiel Kamarado Ĉen Ji faris en sia malsano! Post ricevo de operacio, mi komencis ordigi la poemojn de Kamarado Ĉen Ji, samtempe ricevante radian kaj kemian kuracadon."

La kolekto enhavas 150 titolojn elektitajn el la troveblaj pli ol 350 poemoj de Kamarado Ĉen Ji, verkitajn dum la periodoj de la Ruĝa Armeo (1927-1937), la Kontraŭjapana Rezistmilito (1937-

1945), la Liberiga Milito (1946-1949) kaj la periodo de socialisma revolucio kaj socialisma konstruado post la fondo de la Ĉina Popola Respubliko. Kaj ĝi enhavas ankaŭ la malfacile konservitan kopion de la letero de Kamarado Ĉen Ji al la aŭstra kuracisto F. Rosenthal.

Per jenaj vortoj la antaŭparolo trafe eldiris la signifon de la poemoj de Kamarado Ĉen Ji: "La poemoj de Kamarado Ĉen Ji verkitaj en liaj fruaj jaroj jam montris lian tendencon kontraŭ la malnova socio kaj deziron batali kontraŭ ĝi, tamen nur post kiam li aliĝis al la Partio, precipe post kiam li aliĝis al la batalaj vicoj de la Ruĝa Armeo kaj sin ĵetis en arman batalon, li strikte

ligis sian personan karieron kun la revolucia batalado de Ĉinio. Liaj poemoj fidele registris lian persisteman bataladon kaj diligentan laboradon, kaj ankaŭ spegulas en certa grado la historian vojon iritan de liaj samtempuloj en transformado de la socio kaj konstruado sub la direktado de Prezidanto Maŭ."

Kamarado Ĉen Ji persistadis en gerilado en suda Ĉinio dum 3 jaroj, kiuj estis la plej malfacilaj jaroj en lia vivo. En paŭzoj de batalado li verkis multajn poemojn. Ekzemple, en 1936, li verkis la versaĵon "Gerilado en Suda Gianghi", el kiu tri strofoj legiĝas jene:

*Je la tagiĝ' vekigis frue l' gerilanoj,
Malvarmas la vestaĵoj kun someraj roso-
perloj,*

*cikadoj ĉirpas sur la arboj.
Tutkorpe algluas sin herberoj.*

*Baldaŭ tagmezo. Grumbblas la malplena in-
testaro.*

*Jam tri monatojn ĉesis grenprovizo,
kaj kalkuleblas la ensaka rizo.
Kuiras herbojn ni por manĝpreparo.*

*Subtenon de l' popol' neniam mi forgesos.
Ŝi estas la patrino vivredona,
Mi estas ŝia brava batalanto.
Revolucios mi plej bona.*

En vintro de la sama jaro, Kamarado Ĉen Ji grave vundiĝis kaj estis ĉirkaŭita de malamiko ĉe Mejŝan. Li decidis oferi sian vivon kaj skribis al la Partio kaj popolo siajn "lastajn vortojn" "Tri Strofoj ĉe Mejling", kiun li kaŝis en sia vesto:

*Ja kion mi hodiaŭ volas je forhak' de
l' kapo?
Tra malfaciloj pioniris mi per cent bataloj.
Mi iros en l' inferon por revarbi la soldatojn
kaj la Hadeson senkapigi sub cent mil stan-
dardoj.*

*Dek jarojn daŭris la milito en la suda lando,
la kapo mia devas pendii sur ĉefurba pordo.
La postvivantaj kamaradoj multe penlaboru,
per venkinformoj vi konsolu min eĉ post la
morto.*

*Revolucio estas mia elekta sorto,
finiĝos certe l' sangbataloj de ĉi tiu mondo.
Hodiaŭ mi oferos min pro l' nobla idealo,
ke libereco floru tra la tuta homa rondo.*

Tiu poemo donas al ni vivecan bildon de heroo, kiu pretas sin oferi por la revolucio.

Post la Liberiĝo, ekde 1954 Kamarado Ĉen Ji laboris kiel vicĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro kaj kumule kiel ministro de eksteraj aferoj. En diplomaciaj aferoj, li estis fidela kaj forta asistanto de Ĉefministro Ĝou Enlaj. Konsiderinda parto de liaj poemoj temas pri la amikaj interrilatoj inter la ĉina kaj alilandaj popoloj, sub la direktado de la revolucia diplomacia linio de Prezidanto Maŭ, kaj priskribas la komunan batalon de la tutmonda popolo kontraŭ imperiismo, social-imperiismo kaj hegemoniismo. La kolekto enhavas multajn belajn poemojn verkitaĵojn de li dum sia vizito al multaj aziaj, afrikaj kaj eŭropaj landoj. Iu el ili priskribas afrikan batalan tamburadon, alia egiptan kolosan piramidon, tria pensojn de Kamarado Ĉen Ji dum rigardado de la luno en palaco de la Sudana Respubliko, kaj ankaŭ la poemo "Al Birma Amiko", kiu prikantas la fratan amikecon inter la ĉina kaj birma popoloj, kiuj trinkas el la sama rivero:

*Mi loĝas ĉe la river-kapo,
ĉe ĝia vosto via rondo.
La amikeco ĉiam daŭros,
ni trinkas el la sama fonto.*

Kvankam Kamarado Ĉen Ji brave batalis dekojn da jaroj, tamen li neniam fieris pro siaj grandaj meritoj, kaj en sia poemo "Pensoj je la 63-a Datreveno de la Naskiĝtago" li refoje esprimis sian koran senton:

*Individuo estas ja malforta,
l' amasoj kaj l' Partio ĉion povas.
Mi ĉiam okupiĝis dum jardekoj
pri banalajoj, kun hontiga gloro.
De nun, en la venontaj periodoj,
mi ĉiam iru sur la ĝusta vojo.*

Kaj li foje refoje admonis siajn gefilojn:

*Ne ludu per malplenaj vortoj sen praktika
faro,
ne agu kiel miopulo, zorgu pri l' estonto.*

*Vi estas de l' popolo kulturita,
do ĉion faru vi por la popolo.*

En sia longa revolucia batalado, Kamarado Ĉen Ji verkis multajn poemojn, kiuj montras senliman fidelecon kaj amon de la veterana proletara revoluciisto al Prezidanto Maŭ, la Komunista Partio kaj la popolo, kaj lian malamon kaj malestimon al la reakciularo, imperiismo kaj reviziismo. La poemoj estas sinceraj kaj kortuŝaj kaj la lingvo estas simpla kaj freŝa. La revolucia popolo povas ĉerpi el ili multajn instruojn dum la malamikoj timtremas pro ili. La kontraŭpartia kliko de Lin Biaŭ kaj la "kvarpersona bando" de Vang-Ĝang-Giang-Jaŭ malamis Kamaradon Ĉen Ji. Ili ne nur persekutadis lin dum li vivis, sed ankaŭ plue kalumniis lin kaj liajn versaĵojn post lia morto. Per la potenco en iliaj manoj, ili baris la publikigon de liaj poemoj. Sed la popolo amas liajn poemojn kaj malgraŭ ĉiaj malhelpoj kopiadis unuj de aliaj kaj laŭtlegis en kunvenoj liajn poemojn, tiel ke liaj poemoj povis

vaste cirkuli inter vastaj amasoj. Nur post kiam la Centra Komitato de la Partio estrata de Prezidanto Hua Guofeng frakasis la "kvarpersonan bandon", poemoj de Kamarado Ĉen Ji povis publikigi en gazetoj kaj ĵurnaloj kaj lia poemaro redaktita de Kamaradino Ĝang Kian povas vidi siajn legantojn.

Kamaradino Ĝang Kian skribis en siaj du versaĵoj je plenumo de la redaktado:

*Malĝoje l' samon suferante mi min mem
persvadas,
kaj redaktante viajn verkojn vian vivon
vidas.
Kun libr' en man' mi rememoras viajn
pasintaĵojn,
kaj torentadas viaj pensoj inter la linioj.*

Pli ol ses jaroj jam forpasis post la morto de Kamarado Ĉen Ji, kaj nun legante liajn poemojn oni sentas ankoraŭ pli fortan sopiron kaj altan estimon al la veterana revoluciisto kaj poeto.

Letero al Kamarado F. Rosenthal

Kamarado Rosenthal,

Vi, kiel kontraŭfaŝisma amiko, transpasis oceanojn por veni al Ĉinio kaj partopreni en ĝia Kontraŭjapana Rezistmilito. Krome vi ankaŭ profundigis en postfronton de la malamiko, por labori en la Nova Kvara Armeo. Vi persone vidis kaj spertis ĝian malfacilan luktadon. Pri ĉio de la Nova Kvara Armeo vi ĉiam estas atestanto.

Vi estas plananta verki libron pri la Nova Kvara Armeo. Mi atendas ĝian eldonon. Mi dankas vin por via helpo al la Nova Kvara Armeo kaj tre volas helpi vin, kiel kamarado, plenumi tiun signifan verkon. Ĉi sube mi koncize rakontu al vi mian historion, laŭ via peto.

En 1901, mi naskiĝis en familio de malgranda bienulo de Leĝi-gubernio de la meza parto de Siĉuan-provinco. Kiam mi estis kvin-jara, mi komencis viziti privatan lernejon en la hejmloko. Kiam mi estis sep-jara, mia patrinflanka avo laboris kiel malgranda registara oficisto en Hubej-

provinco, kies ofico estis aĉetita de li per 200 uncoj da arĝento. Mia patro venis tien por labori kiel skribisto kaj ankaŭ mi tie vizitis lernejon. Tie mi loĝadis en la oficejo. Tiam neforgeseble min impresis tio, ke oni ofte kruele batis krimulojn en la oficejo. Vidinte tion mi tre ĉagreniĝis kaj kompatis la suferantojn. De tiam en mia koro ekĝermis indigno kontraŭ la malnova socio.

Tie mi pasigis pli ol du jarojn. La putreco kaj mallumeco de la registaro de King-dinastio vekis ĉe mi ekstreman antipation kontraŭ ĝi. Mi ne plu volis vivi dependan vivon sub alies tegmento kaj firme postulis permeson forlasi la hejmon de mia avo. Poste mi iris al Ĉengdu kune kun la patro, ĉar niaj bieno kaj domoj en la hejmloko jam estis forvenditaj kaj la tuta familio translokiĝis en antaŭurbon de Ĉengdu. Mia familio devis lui bienulajn domon kaj teron por sin vivteni.

En la jaro 1911, kiam mi estis dek-jara, eksplodis la ĉina burĝa demokratia revolucio¹. En nia

provinco Siĉuan la revolucio estis gvidata de burĝaraj reformistoj, kiuj ĉiutempe intencis kompromisi kun la registaro de King-dinastio. Sed en la malsupera tavolo partoprenis progresemaĵoj intelektuloj kaj vastaj amasoj de kamparanoj, kiuj estis ekstreme firmaj kaj kuraĝaj. Tiam mi ankoraŭ ne komprenis politikan signifon de la revolucio, sed mi propraokule vidis efektivan ribelon, kaj ĝi vekis resonadon en mia infana animo.

En Ĉengdu mi vizitis plurajn elementajn lernejojn kaj poste eniris en A-klasan industrian lernejon. Sed, efektive tiam mi interesiĝis nur pri politiko kaj literaturo. Post la Revolucio de 1911, senĉese bataladis militaristoj de Siĉuan-provinco kaj tio altiris al mi atenton pri politikaj kaj sociaj problemoj. Sed, la familia edukado en mia infanaĝo, la influo de miaj instruistoj en Ĉengdu, kiuj bone scias la ĉinan literaturon, kaj la Ĉengdu-a natura medio plena je historiaj restaĵoj de literaturo kaj arto puŝis min sur la vojon de literaturo.

En 1919, eksplodis la Movado de la 4-a de Majo, kiu pledis por ideologia liberigo kaj kultura renovigo. Ĝi multe ŝanĝis mian ideologion. Tiam inter mia familio kaj la bienulo okazis konflikto pri terrento kaj ni foruzis multe da mono por proceso en pluraj jaroj. Tio preskaŭ bankrotigis mian familion. Mia familio ne plu povis pagi por mi lernadon, kaj mi devis forlasi la familion kaj komenci sendependan vivon. Ĝuste tiam mi sukcese trapasis ekzamenon por iri al Francio por tie labori kaj lerni kaj ricevis subvencion de la registaro de Siĉuan-provinco por veturkosto. Tiel mi venis al Francio kaj vizitis lernejojn per mia laborpago.

En oktobro de 1919, mi iris al Marsejlo kaj en la fino de tiu jaro al Parizo kaj en oktobro de 1921 revenis al la patrolando. Dum la du jaroj mi komencis studi teorion de socialismo, zorgis pri la tiama rusa revolucio, samtempe multe legis francajn literaturajn verkojn, precipe tiujn de Jean Jacques Rousseau kaj Viktoro Hugo. Mi laboris ok monatojn en iu fabriko de Parizo. Poste mi estis arme eskortita de la registaroj de Ĉinio kaj Francio en kunagado al la patrolando pro tio, ke mi partoprenis en la patriota movado

de ĉinaj studentoj en Francio en somero kaj aŭtuno de 1921. Tiam mia "kulpo" anoncita en Parizo kaj Liono estis tio, ke mi partoprenis en bolŝevika aktivado.

En la komenco de 1922, mi revenis al Siĉuan. Mi laboris unu jaron kiel redaktisto de la ĵurnalo "Nova Siĉuan" en Ĉongking. En tiu periodo mi aliĝis al la Ĉina Komunisma Junulara Ligo. En vintro de 1923, mi venis al Pekino kaj studis en la Ĉina-Franca Universitato, kaj post nelonge mi aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio. De tiam mi komencis partopreni en studenta, laborista kaj popola revoluciaj movadoj. Kaj samtempe mi nominale daŭrigis lernadon en la universitato ĝis mi sukcese trapasis la diplomantan ekzamenon en la fino de 1925.

En tiu periodo, mi ankoraŭ ne forlasis mian intereson pri literaturo, mi tradukis francajn literaturajn verkojn kaj ankaŭ skribis multajn poemojn kaj novelojn sub pseŭdonimo. Mi intencis influĝi ĉinan literaturon per marksisma vidpunkto. Mi publikigis jenajn artikolojn: (1) «Pri Laborula Literaturo», (2) «Kritiko al Romain Rolland kaj Lia Heroismo», (3) «Kritiko al Anatole France», (4) «Pri Verkoj de Henri Barbusse», (5) «Disputo kun Hju Ĝimo je la Unua Datreveno de la Forpaso de Lenin». Tiuj artikoloj estis skribitaj sub la influo de la Partio.

Post la jaro 1925, mi ĉesigis mian literaturan vivon, ĉefe okupiĝis pri revoluciaj laboroj komisiitaj de la Partio kaj fariĝis profesia revoluciulo kun firma revolucia starpunkto.

En la jaro 1926, en Pekino okazis la Masakro de la 18-a de Marto². Ne povinte resti en Pekino por publika aktivado, mi revenis al Siĉuan por helpi la Norden-Ekspedician Armeon³. En 1927, mi estis sendita al la Vuhan-a Centra Milita Lernejo por fari tie politikan laboron. Nelonge post la Kontraŭrevolucia Arma Puĉo je la 12-a de Aprilo, la Vuhan-a Kuomintang publikis deklaris oponi kontraŭ la Komunista Partio de Ĉinio. Mi iris de Vuhan al Gianghi, kuratingis la trupon de la Insurekcio de la 1-a de Aŭgusto kaj militiris suden kune kun ĝi. De tiam mi partoprenis en la arma batalado sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio ĝis nun.

Sub la gvido de Kamarado Ĝu De mi kaj la parto de la trupo de la Nanĉang-a Leviĝo, militadis sude kaj norde kaj atingis la sudan parton de Hunan-provinco. En 1928, la trupo kuniĝis en Gingsangŝan kun tiu de la Aŭtun-rikolta Leviĝo gvidata de Kamarado Maŭ Zedong kaj organiziĝis kun la lasta en la Kvaran Armeon de la Ruĝa Armeo kaj mi laboris en ĝi kiel ĝia diviziestro, sekretario de ĝia partia komitato k.a.

En la kvin jaroj de 1929 ĝis 1934, mi partoprenis en konstruado de la Centra Soveta Regiono, laboris kiel armeestro kaj komandanto de milita regiono k.a. kaj plejparte militadis en fronto. Mi dufoje vundiĝis kaj estis duonkriplulo laŭ diagnozo de kuracisto. La Soveta Centra Registaro dufoje donis al mi ordenon Ruĝa Stelo. En du Tutlandaj Sovetaj Kongresoj mi estis elektita kiel komitatano de la Soveta Centra Komitato.

En oktobro de 1934, la ĉefa trupo de la Ruĝa Armeo en la Gianghi-a Centra Soveta Regiono komencis Longan Marŝon. Tiam, grave vundita, mi estis restigita en Gianghi por servi kiel milita komandanto kaj gvidi registaran laboron. En printempo de 1935, ni trarompis la fortan sieĝan linion de la malamiko kaj translokiĝis de la Centra Soveta Regiono al la suda regiono de Gianghi-provinco. Tie ni persistis en gerila batalo dum preskaŭ tri jaroj, kiuj estis por mi la plej malfacila periodo de revolucia batalado.

En tiuj jaroj, mi kaj miaj kunuloj ne havis loĝdomon kaj devis kampadi sub la ĉielo. La pluvegajn, ventegajn kaj neĝajn tagojn ni ĉiuj pasigis en arbaro aŭ ŝtona kaverno. Ni kutime dormis tage kaj marŝis nokte. La malamiko faris al ni kruelan ĉirkaŭekstermon per traserĉado kaj bruligado al montoj, transloĝigo de loĝantaro, fermado de tuneloj, sieĝado k.a. Nia kontraŭrimedo estis disvolvi elastan geriladon subtenate kaj ŝirmate de amasoj. La gerila taktiko atingis tre altan nivelon. La tri-jara gerila milito en suda Gianghi, same kiel la Longa Marŝo de 25,000 lioj, pruvis, ke la Komunista Partio de Ĉinio estas nevenkebla granda revolucia forto.

En 1937, komenciĝis la Kontraŭjapana Rezistmilito de Ĉinio. La ruĝaj gerilaj taĉmentoj en suda Ĉinio reorganizigis en la Novan Kvaran

Armeon de la Nacia Revolucia Armeo kaj mi estis nomumita kiel komandanto de la unua taĉmento de la Nova Kvara Armeo. En printempo de 1938, nia trupo profundiĝis en postfronton de la malamiko kaj mi estis taskita fari geriladon en la regiono de Ŝanhajo ĝis Nankino. En 1940, dum batalado kontraŭ la japanaj rabistoj kaj kontraŭkomunistaj obstinuloj, ni kreis la kontraŭjapanan bazlokon de norda Giansu-provinco. Mi iam laboris kiel komandanto en stabo de norda Giansu-provinco kaj la ĉefstabo de centra Ĉinio de la Nova Kvara Armeo. En 1941, post la Sud-Anhuj-a Evento, la Milita Komisiono de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio nomumis min aganta estro de la Nova Kvara Armeo. La kvar-jara kontraŭjapana milito pruvis, ke la japana imperiismo estas feroce malamiko kaj la Nova Kvara Armeo estas nevenkebla armeo. En la komenco la Nova Kvara Armeo estis tre malforta, tamen ĝi pli kaj pli fortiĝis en la batalado kontraŭ la japanaj agresantoj.

Kara Kamarado Rosenthal, la supre dirita estas konciza resumo de mia travivaĵo de 41 jaroj. Se vi demandus al mi, kiajn komprenaĵojn mi havas pri la batalo, mia respondo estus: Kompartiano povas havi senkomparajn kuraĝon kaj forton, firme batali ĝisfine kontraŭ en- kaj eksterlandaj malamikoj kaj plenumi la revolucian taskon, se li, sub la gvido de la Partio, tenas intiman rilaton kun la vastaj amasoj.

Kara Kamarado Rosenthal, mia historio estas finrakontita.

Bonvole diru al mi vian opinion.


Saluton!

Ĉen Ji, je la 8-a marto, 1942,
en Tingzigang de Janfu-regiono
en norda Giansu-provinco

1 La Revolucio de 1911 estis gvidata de Sun Jatsen. Ĝi okazis en la 10-a de oktobro de 1911, renversis la registaron de King-dinastio kaj starigis la Respublikon de Ĉinio.

2 La Masakro de la 18-a de Marto de 1926, estis evento ke la registaro de Duan Kijuj pafmortigis peticiantajn amasojn je la 18-a de marto, 1926.

3 Norden-Ekspedicia Armeo estis revolucia armeo, kiu organiziĝis en la unuafoja kunagado de Kuomintango kaj la Komunista Partio de Ĉinio en 1924, kaj en 1925 ĝi militiris Norden de suda Ĉinio por puni feŭdajn militaristojn subtenatajn de imperiismo.



Spruc-irigaciado de Sujnan-brigado de Giangmen, Guangdong-provinco

Pri la meĥanizado de la ĉina agrikulturo

DEMANDO: Kiel elmetiĝis la celajo fundamente efektiviĝi meĥanizado de la ĉina agrikulturo en 1980?

RESPONDO: En 1955, kiam leviĝis en Ĉinio alta tajdo de agrikultura kooperativigo, Prezidanto Maŭ instrukiis, ke oni nepre devas kunligi la socian reformon de agrikulturo kun ĝia teknika renovigo, kaj fundamente efektiviĝi agrikulturan meĥanizado de la tuta lando en 25 jaroj, t. e. ĝis la jaro 1980, kaj alvokis al la tuta popolo strebi energie por plenumi tiun grandan taskon. En 1959, post ĝenerala komunumigo en la kamparo de la tuta lando, Prezidanto Maŭ denove instrukiis: “**La radikala solvo de la agrikultura problemo estas meĥanizado**”. En 1966, Prezidanto Maŭ instrukiis kunvoki la Unuan Tutlandan Konferencon pri Agrikultura Meĥanizado. En 1971, okazis sub prezidado de Kamarado Hua Guofeng la Dua Tutlanda Konferenco pri Agrikultura Meĥanizado kaj resumis la sperton de nia lando en irado de propra vojo de agrikultura meĥanizado. En 1975, Kamarado Hua Guofeng proklamis denove la celajon fun-

damente efektiviĝi agrikulturan meĥanizado en la Unua Tutlanda Konferenco pri Lerno de Daĝaj en Agrikulturo kaj postulis kombini la agrikulturan meĥanizado kun la movado de lerno de Daĝaj en agrikulturo.

Post frakaso de la “kvarpersona bando”, Prezidanto Hua Guofeng foje kaj refoje instrukiis “bone entrepreni agrikulturan meĥanizado” kaj faris klarajn dispoziciojn pri tio.

DEMANDO: Kio estas la konkreta celajo por 1980?


RESPONDO: La plenumenda tasko ĝis la jaro 1980 estas anstataŭi per maŝinoj manlaborojn je ĉ. 70% en la ĉefaj agrikulturaj laboroj kiel plugado, irigaciado, protektado de plantoj, rikoltado, prilaborado de agrikulturaj kaj flankokupaj produktaĵoj, transportado kaj fundamenta agrara konstruado. Koncerne al sterkado, 40 kg. da kemia sterko devos esti uzata por ĉiu muo da tero, krom uzo de organika sterko. Kaj ankaŭ en forstkulturo, brutobredado kaj fiŝado la ĉefaj laboroj devas esti meĥanizitaj ĝis tia nivelo.

Ĉinio estas disvolviĝanta socialisma lando. Antaŭ la Liberiĝo, ĝia agrikulturo estis tre postiginta, kaj krome pro la vasteco de ĝia teritorio la naturaj kondiĉoj estas tre diferencaj, tial la meĥaniza nivelo atingita en 1980 estos unuapaŝa kaj malalta. Tamen surbaze de tio ni faros pluan strebadon kaj certe povos efektiviĝi pli altan meĥanizon kaj plene efektiviĝi modernigon de agrikulturo je la fino de tiu ĉi jarcento.

DEMANDO: Kion oni jam atingis en agrikultura meĥanizo?

RESPONDO: De efektivigo de agrikultura kooperativigo en 1955 ĝis nun, nia agrikultura meĥanizo gajnis nemalgrandajn sukcesojn, malgraŭ ke Liu Ŝaŭki, Lin Biaŭ kaj la “kvarpersona bando” faris subfosadon. En la periodo de 1966 ĝis 1976, la produktokvanto de grandaj kaj mezgrandaj traktoroj kreskis meznombro je 20.3% en ĉiu jaro; tiu de traktoretoj je 46.4%; la totala povo de la pumpmaŝinoj kreskis pli ol sesoble; la produktokvanto de kemisterko kreskis pli ol trioble. Ankaŭ aliaj agrikulturaj maŝinoj multigis rimarkeble. Iuj gubernioj kaj subprovincoj de nia lando jam fundamente efektivigis agrikulturan meĥanizadon.

Laboristoj de la Dua Fabriko de Agrikulturaj Maŝinoj de Daje-gubernio, Hubej-provinco, muntas motorajn transplantilojn de rizplantoj.



Nia industrio de agrikulturaj maŝinoj kun relative kompletaj fakoj kaj racie dislokitaj fabrikoj jam atingis certan skalon. En la tuta lando jam troviĝas pli ol 1,600 fabrikoj de agrikulturaj maŝinoj, kiuj povas fari ĉiajn agrikulturajn maŝinojn bezonatajn en nia lando. Plejparto de la provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj jam havas siajn industriojn de traktoroj kaj motoroj kaj mezgrandajn kaj malgrandajn fabrikojn de fero kaj ŝtalo. 97% de niaj gubernioj jam fondis fabrikojn por fari kaj ripari agrikulturajn maŝinojn kaj plejparto de la popolaj komunumoj kaj iuj el la produktaj brigadoj jam havas agrikulturilan riparejon. La ŝtata industria fako de agrikulturaj maŝinoj, la provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj kaj plejparto de la subprovincoj kaj gubernioj jam fondis specialajn institutojn por esplori, fabrikaj kaj disvastigi diversajn agrikulturajn maŝinojn konvenajn al la malsamaj klimataj kaj topografiaj karakterizaĵoj de nia lando kaj povantajn akceli altan stabilan produktadon. Senĉese kreskas ankaŭ la nombro de manipulantoj de agrikulturaj maŝinoj. Ĉio ĉi tio metis relative firman bazon por fundamente efektiviĝi agrikulturan meĥanizon en 1980.

DEMANDO: Kio estas la bazo kaj principo de Ĉinio por la agrikultura meĥanizo?

RESPONDO: La agrikultura meĥanizo de nia lando baziĝas sur la agrikultura kolektivigo, laŭ la instrukcio de Prezidanto Maŭ. La pli ol 700 milionoj da kamparanoj de la tuta lando estas organizitaj en pli ol 50,000 popolaj komunumoj. Ĉar la kampoj de popola komunumo apartenas al kolektivo kaj ĝi posedas certajn homfortojn, materialon kaj financajn rimedojn, tio pretigis favorajn kondiĉojn por agrara fundamenta konstruado en granda skalo, starigo de industrio de la komunumoj kaj brigadoj en servo al agrikultura meĥanizo kaj akumulo de kapitalo por aĉeti agrikulturajn maŝinojn.

En fabrikado de agrikulturaj maŝinoj, ni praktikas la principon de kombino de centra kaj loka industrioj, prenante la lastan kiel la ĉefforton; koncerne al la normoj de agrikulturaj maŝinoj, ni produktas samtempe grandajn, mezajn kaj malgrandajn, prenante la lastajn du specojn kiel la ĉefajn; en aĉeto de agrikulturaj maŝinoj, la



Rondira lan-tonda grupo de Hingiang en laboro



Transplantado de rizplantiĉoj en Hajnan-insulo

pagoj ĉefe venas de la financaj rimedoj de la komunumoj kaj brigadoj kaj la ŝtato donas nur necesan helpon. Tiamaniere la aktiveco de la lokoj kaj popolamasoj povas esti plene disvolvita kaj la agrikultura meĥanizado povas esti disvolvita multe, rapide, bone kaj ekonomie, en sinapogo sur propraj fortoj kaj laŭ la lokaj kondiĉoj. Ni prenu Hebej-provincon kiel ekzemplon. Dank' al praktiko de la supra principo, la subprovincoj kaj gubernioj de la tuta provinco energie fondis malgrandajn fabrikojn de fero, ŝtalo kaj agrikulturaj maŝinoj per la amasoj kaj nun ĝia ĉiujara produktokvanto de dizeloj kaj elektraj motoroj estas trioblo de tiuj produktitaj de la tuta lando en 1965. Dank' al disvolvo de malgrandaj industriaj entreprenoj kaj flankokupoj, multaj komunumoj kaj brigadoj de la provinco havigis al si pli multe da akumulita kapitalo, kio pligrandigis la eblecon por aĉeti agrikulturajn maŝinojn. La popolo de Zunhua-gubernio de la provinco jam fundamente efektivigis agrikulturan meĥanizon per sia strebado en 10 jaroj, disvolvante industriajn entreprenojn kaj aliajn flankokupojn de la komunumoj kaj brigadoj utiligante lokajn riĉfontojn, kaj 93% de la uzata kapitalo por tio estis akumulita de la komunumoj.

DEMANDO: Kia perspektivo prezentiĝas pri la fundamenta efektivigo de agrikultura meĥanizado en 1980?

RESPONDO: Kvankam la tempo estas mallonga kaj la tasko peza, tamen ni jam havas necesajn kondiĉojn por tio.

Antaŭ ĉio, frakasiĝis la “kvarpersona bando” kaj tiamaniere la plej granda obstaklo por la agrikultura meĥanizado estis forigita. Antaŭ kelkaj jaroj, la “kvarpersona bando” plenenergie subfosis la agrikulturan meĥanizadon kaj la produktadon, kaj tio kaŭzis al pluraj grandaj fabrikoj de agrikulturaj maŝinoj tutan aŭ duonan produktoĉesigon. Post la falo de la “kvarpersona bando”, sub la gvido de Prezidanto Hua, la linio, principo kaj politikoj por agrikultura meĥanizado difinitaj de Prezidanto Maŭ estas efektivigitaj kaj bonega situacio aperis en la industrio de agrikulturaj maŝinoj de nia lando. En la pasinta jaro, la ŝtataj produktaj planoj de 15 ĉefaj agrikulturaj maŝinoj estis plenumitaj antaŭdate je unu aŭ du monatoj.

Due, nia konstruado de pli ol 20 jaroj jam starigis konsiderindan materian bazon, niaj fundamentaj industrioj, industrioj de agrikulturaj

maŝinoj kaj kemia sterko jam havas certan kapablon por agrikultura meĥanizo. En la estonteco, la ŝtato donos al agrikultura meĥanizado pli multe da kapitalo, ŝtalaĵoj kaj aliaj materialoj. Pli grandigis ankaŭ la helpo de la industrio al agrikulturo. Kaj krome, la ŝtato konstruos aŭ pli grandigos nombron da fabrikoj de agrikulturaj maŝinoj kaj la produkta povo de tiaj maŝinoj certe ĉiam pli grandigos.

Trie, oni akumulis multajn spertojn en agrikultura meĥanizado, en kio aperis bonaj tipoj. Nun ni havas sperton ne nur pri agrikultura meĥanizado en gubernio, komunumo kaj produkta brigado, sed ankaŭ pri rapidigo de agrikultura meĥanizado en subprovinco kaj provinco. Ekzemple, antaŭ 6 jaroj postgintaj estis la bazaj industrioj, industrioj de agrikulturaj maŝinoj kaj

kemia sterko de la Guanghi-a Ĝuang-nacieca Aŭtonoma Regiono en suda Ĉinio, kompare kun tiuj de aliaj partoj de la lando. Dank' al strebado en la lastaj jaroj, ĝi jam enviciĝis al la landaj avangardaj unuoj en produktokvanto de ŝtalo, traktoroj, traktoretoj, internbrulaj motoroj kaj kemisterko. Ĝi povos efektiviĝi fundamente agrikulturan meĥanizadon en tri jaroj ĉefe per siaj propraj fortoj. Ankaŭ Ŝandong, Hunan, Giangsu kaj Hebej akiris bonajn sukcesojn en agrikultura meĥanizado en la lastaj jaroj. En januaro de la kuranta jaro, okazis en Pekino la Tria Tutlanda Konferenco pri Agrikultura Meĥanizado kaj la gvidado al la agrikultura meĥanizado estas plifortigita tiel en la centro kiel en la lokoj. Nun leviĝis tra la tuta lando alta tajdo de agrikultura meĥanizado.

Ŝen Kjong kaj lia trovo de fruperioda ezofaga kancero

ŜEN Kjong estas maljuna instruisto de la Henan-a Medicina Instituto. En 1960 li, kiel membro de la Esplora Taĉmento pri Prevento kaj Kuracado de Tumoro de Henan-provinco, venis al Linhian-gubernio por fari preventadon kaj esploradon de ezofaga kancero. En la pasintaj 18 jaroj li kuracadis malsanojn por popolamasoj kaj enketis pri kazoj de ezofaga kancero.

Dum enketado kaj kuracado Ŝen Kjong rimarkis, ke plejparto de la pacientoj estas suferantoj de mez- aŭ malfru-perioda ezofaga kancero. Tio venigis lin al la penso, ĉu oni povas trovi simplan kaj taŭgan rimedon por ĝustatempe malkovri kaj kuraci suferantojn de ezofaga kancero en frua periodo. En tiu tempo diagnozado de tiu malsano estis farata nur per du rimedoj: X-radia esploro kaj ezofagoskopa ekzamenado. La unua

povas nur malkaŝi malsanulojn de meza aŭ malfrua periodo kaj ne povas malkaŝi difektiĝon de frua periodo. Pro tio ke la difektiĝo en la frua periodo de tiu malsano estas neokulfrapa, estas tre malfacile diagnozi la malsanon per ezofagoskopo kaj oni eĉ povas difekti la ezofagon en ekzamenado pro mallerta manipulado. Sur la bazo de enketado kaj serioza resumado de pasintaj spertoj, Ŝen Kjong metis la gravitan punkton de sia laboro en la studadon pri citologia diagnozo pri fruperioda kancero. Por apliki tian metodon oni unue devas havi taŭgan instrumenton por elpreni ĉelojn el ezofago.


En la komenco Ŝen Kjong prove uzis kaŭĉukan tubeton kun aerplena saketo ĉe ĝia fino por elpreni ĉelojn de ezofago. Li foje-foje englutis kaj elteris ĝin, malgraŭ naŭzo, vomado kaj doloro

de la gorgo. Sed la aersaketo estis tro glata kaj ne povis elpreni ĉelojn. Poste li kovris la aersaketon per reto kaj sukcesis elpreni multajn ĉelojn, tamen tio tre dolorigis. Li multfoje ĝin plibonigis, kaj post pli ol unujara praktikado li fine sukcesis elfari relative idealan elprenilon de ezofagaj ĉeloj, sub la helpo de la Ŝanhaja Kvina Kaŭĉuka Fabriko.

Kun ĝi Ŝen Kjong ĝoje venis en la komunumon de Jaŭcun dek kilometrojn for de la gubernia urbo por fari ĝeneralan ekzamenadon. Sed, li trovis neniun kanceran ĉelon el la multaj ekzamenitaj personoj. Kie estas la kaŭzo? Ĉu inter tiuj personoj vere ne estas suferantoj de kancero aŭ la instrumento ne taŭgas?

Por trovi la kaŭzon Ŝen Kjong kune kun la aliaj medicinaj laborantoj serioze faris diskutadon kaj studadon. Ili opiniis ke la ĉefa kaŭzo estas, ke la karakterizaĵoj de kancera ĉelo ne estis bone konitaj de ili. Ili do donis multajn atentojn al tiu flanko kaj faris atentajn observadojn kaj analizadon al mikroskopaj ĉelaj ŝmirpecoj de pli ol 130 suferantoj de ezofaga kancero de meza kaj malfrua periodo, legis materialojn pri citologia diagnozo, kaj konis paŝon post paŝo la malsamajn karakterizaĵojn de la ordinaraĵaj, inflamaj, generaj kaj kanceraj ĉeloj de ezofago kaj jam povas malkaŝi 87 procentojn de la kazoj de ezofaga kancero per citologia diagnozo.

Malebena estas la vojo de citologia diagnozo pri ezofaga kancero. En la komenco Ŝen Kjong povis trovi nur kazojn de ezofaga kancero de meza kaj malfrua periodo. Por trovi fruperiodajn pacientojn li refoje elprenis la ĉelajn ŝmirpecojn kolektitajn de li kaj zorge ilin ekzamenis kaj esploris kaj fine trovis unu fruperiodan kanceran ĉelon en angulo de iu ŝmirpeco. Post refoja ekzamenado al la paciento li diagnozis, ke li suferas de fruperioda ezofaga kancero kaj faris al li operacion. Li faris komparon pri hista sekcaĵo de la ektomia specimeno post operacio kun la ĉela ŝmirpeco, kaj per tio pruvis pliapaŝe, ke ĝi vere estas kazo de ezofaga kancero en frua periodo, kaj skribis, laŭ la rezulto, «Raporton pri Unu Kazo de Fruperioda Ezofaga Kancero».



Ŝen Kjong en laboro

Tiu malkovro multe ĝojigis Ŝen Kjong kaj la aliajn taĉmentanojn. Tamen kiel oni povas trovi pli multajn fruperiodajn suferantojn de kancero? Ili bone scias en praktiko ke la simptomoj de fruperioda ezofaga kancero estas tre moderaj, tial ili ofte estas malatentaj de la malsanuloj kaj ne povas ricevi ĝustatempan kuracadon. La malsanuloj viditaj de kuracistoj en hospitaloj estas plejparte pacientoj de la meza kaj malfrua periodoj. Tial, ili decidis iri en kamparon kaj faris ĝeneralan ekzamenadon al vastaj popolamasoj por trovi malsanulojn.

Fari ĝeneralan ekzamenadon al la popolamasoj, dise loĝantaj en Linhian-gubernio en Tajhang-montregiono estas peniga laboro. Ĉu en varmega somero aŭ en frosta vintro, Ŝen Kjong kaj liaj taĉmentanoj grimpis montojn kaj travadis riverojn por disvastigi sciojn pri prevento de kancero al popolamasoj kaj ilin ekzameni. Dum ĝenerala ekzamenado Ŝen Kjong notis detale la karakterizaĵojn de la ĉelaj ŝmirpecoj kaj faris

Vizito al longvivulo Ju Ŝengguang



Ju Sengguang

EN Ĉinio cirkulas popola diro: “De la pratempo estas malmultaj homoj, kiuj povas ĝisvivi 70 jarojn.” Tamen Ju Ŝengguang, kamparano de Ŝaŭjang-komunumo de Pinggiang-gubernio, Hunan-provinco, jam aĝas 110 jarojn. Antaŭ nelonge ni intervjuis tiun grandaĝulon.

La hejmloko de la maljunulo estas pitoreska loko kun akvo kaj montoj. Enirinte pordon de brika domo, ni vidis blankharan maljunulon kun vizaĝo radiantan infanan brilon. Kiam ni kun ĝojo rigardadis lin, li haste iris renkonte al ni kaj diris: “Kamaradoj, vi venas vidi mian patron, ĉu ne? Mi voku lin.” “Kiun aĝon vi...” “Mi havas 83 jarojn.” Ni ekridis nereteneble. Se

li tion ne dirus, ni misprenus lin por la patro. Kiam ankoraŭ ne ĉesis nia rido, eliris lia patro. Sen helpo de aliulo aŭ bastono li iris libere. Informiĝinte pri la celo de nia vizito, li rakontis al ni pri sia travivaĵo kaj respondis al ni demandojn.

La maljunulo naskiĝis en malriĉa kamparana familio en 1867. Li diris: “Mi travivis plurajn dinastiojn kaj ekhavis bonan vivon nur post la Liberiĝo. Vere grandaj estas la Komunista Partio kaj Prezidanto Maŭ!” Lia parolo estis klara kaj lia ridado sonora. Kial li povas vivi tiel longe kaj sane? Li diris, ke la ĉefa kaŭzo estas persistado en fizika laboro kaj gimnastika ekzerco.



studadon pri ili. Foje en ekzamenado li trovis, ke iu avino probable suferas ezofagan kanceron. Li 8-foje ekzamenis kaj faris por ŝi dekojn da ĉelaj ŝmirpecoj, kiujn li atente ekzamenis kaj analizis ĝis plena kono pri la kazo. Tiamaniere, Ŝen Kjong kaj la membroj de la Esplora Taĉmento kune kun la Pekina Kuraca Taĉmento kaj lokaj kuracaj laborantoj, en pli ol dek jaroj, trairis ĉiujn komunumojn kaj ĉiujn brigadojn kaj faris ĝeneralan citologian ekzamenon pri ezofaga kancero je dekmiloj da homoj-fojoj. Ili trovis el la ekzamenitaj homoj multajn suferantojn de fruperioda ezofaga kancero kaj donis al ili ĝustatempan kuracadon.

Samtempe kun la sukceso en citologia diagnozo al fruperioda ezofaga kancero Ŝen Kjong kaj la

membroj de la taĉmento pliapaŝe trovis karakterizaĵojn de X-radiogramo kaj simptomojn de fruperioda ezofaga kancero, kaj starigis sintezan metodon de citologia, X-radiada kaj laŭsimptoma diagnozo pri fruperioda ezofaga kancero. Dank’ al tio altiĝis la diagnoza nivelo de tiu malsano.

Dank’ al la sukcesa frua diagnozo ebligis kuracado al la malsano en frua periodo, kaj rezultoj de operacio, radioterapio kaj apliko de kuracado de ĉina kaj okcidenta medicino en kombino estas atingitaj. En la pasintaj pli ol dek jaroj, ili kune kun la membroj de la Pekina Kuraca Taĉmento kaj lokaj kuracistoj faris operacion al pli ol du cent suferantoj de fruperioda ezofaga kancero kaj akiris bonajn rezultojn.

En sia 9-jara aĝo li jam komencis labori. Li paŝtis bovojn por bienulo kaj laboris kiel jara kaj taga dungito. Kiam li havis pli ol 80 jarojn, li ankoraŭ povis vektoportu ŝarĝon de 50 kilogramoj. En sia 90-jara aĝo li povis plugi kaj semi. Antaŭ du jaroj li ankoraŭ partoprenis en kolektiva produkta laboro. Eĉ nun li ankoraŭ helpas en hejmaj laboroj.

La maljunulo diris: "Mi jam kutimiĝis al laboro, sen tio ŝveliĝas miaj manoj kaj piedoj kaj malboniĝas mia farto, kiel oni diras, malsano devenas de mallaboremo. Iuj admonis, ke mi ne multe moviĝu pro granda aĝo, alie mi trafus apopleksion. Tamen mi opinias, ke movado povas vigligi muskolojn kaj sangocirkuladon, se oni ne moviĝas, do sango ne povas glate cirkuli kaj oni facile trafas apopleksion."

Aŭdinte tion, mi ekmemoris parolon de iu fama kuracisto: "Neniu mallaboremulo povas longe vivi." La 110-jara maljunulo pruvis per sia centjara praktikado, ke fizika laboro ja estas plej grava faktoro de sano.

En la pasinta vivo Ju Ŝengguang dufoje suferis gravan malsanon, post kio li sentis sin tre malforta. Por restarigi sian energion, li persiste praktikis ĉinan tradician luktarton, kaj tio poste fariĝis lia kutimo. Ĉiutage antaŭ sia 80-jara aĝo

li praktikis luktarton matene kaj vespere, kion li malofte interrompis. Parolante tion la maljunulo faris al ni prezentadon kaj la ĉeestantoj multe laŭdis lin pro lia facila movado. Post fino de la prezentado, mia akompananto iris palpi al li la pulson kaj kun rideto diris al mi: "Regule kaj forte batas la pulso kaj mola estas lia angio. Videble, tio ne estas atingita en unu tago!" La maljunulo diris, ke en la estinteco, se li laciĝis pro vektoportado, li faris luktarton, kaj se doloris al li la talio dum terkulturado, li do etendadis siajn membrojn kaj poste rekomencis laboron. Post sia centjara aĝo, li ĉiam persistas en promonado.

Fizika ekzercado estas pli utila ol medikamento por la homa sano. La ekzercado estas fundamenta rimedo por fortigi la korpon kaj plibonigi la internajn faktorojn. Same kiel fizika laboro ĝi estas bona rimedo por fortigi la korpon. Tamen ĝi havas sian apartan rolon. Tio estas la plej grava sperto de la maljunulo pri sia longviveco. Pri sia vivkutimo la maljunulo diris, ke li ne trosate manĝas, multe nutras sin per vegetalaj manĝaĵoj, persistas en frua ellitiĝo kaj estas optimisma rilate al malfaciloj. Li foje-refoje emfazis, ke post la Liberiĝo la Partio kaj la registaro donis al li feliĉan kaj stabilan vivon en liaj lastaj jaroj.



NOVAJ ATINGOJ EN ESPLORO PRI LA TEORIO DE FUNKCIOJ

Ĉina juna matematikisto Ĝang Guanghoŭ, pri kiu ni raportis en n-ro 11 de 1977, atingis novajn

gravajn rezultojn de monda nivelo en esplorado pri la teorio de funkcioj.

Antaŭ unu jaro, li kaj Jang Le eltrovis, en studo pri valordistribua teorio de meromorfikaj funkcioj, ke inter deficitaj valoroj kaj singularaj direktoj ekzistas rilatoj. Lastatempe, Ĝang Guanghoŭ sukcesis eltrovi rilatojn inter jenaj tri konceptoj en la teorio pri integraj funkcioj kaj meromorfikaj funkcioj: la deficitaj valoroj de integraj funkcioj aŭ meromorfikaj funkcioj, asimptotikaj valoroj kaj juliaj direktoj (speco de singulara direkto). En sia traktato kun pli ol 50,000 vortoj, li detale kaj sisteme klarigis siajn opiniojn kaj faris konkretan matemati-

kan pruvon pri tiuj rilatoj kaj pli penetrive montris la objektivajn leĝojn spegulitajn de integraj funkcioj aŭ meromorfikaj funkcioj. Kaj krome, Ĝang Guanghoŭ solvis kvar problemojn pri la teorio de asimptotikaj valoroj nesolvitajn dum multaj jaroj en la mondo.

KAPTO DE GRANDA BALENO

La balenkapta taĉmento de la Ljuda-a Akvoprodukta Kompanio de nia lando refoje kaptis grandan balenon en la dua tagdeko de decembro 1977. Ĝi longas 17.1 metrojn kaj pezas pli ol 40 tunojn.

Kanta de la Juneca

(Daŭrigo)

“Brave, tre bone! Bis!” subite sonis fremda voĉo, kiu surprizis la tutan ĉeestantaron en la ĉambro. Ĉiuj direktis sian rigardon al la pordo kaj trovis junulon, kiu staris tie aŭskultante. Tiuj, kiuj konis lin, tuj aklamis:

“Ho, vi venis, maljuna Lu!”

Baj Liping saltis al li kaj firme premis al li la manon. Ŝi alparolis lin, kun elkora rideto: “Lu Giaĉuan, mi ne vidis vin jam delonge!”

Lin Daŭging eksentis skueton en sia koro antaŭ la eleganta kaj mezalta staturo, la inteligentaj kaj belaj grandaj okuloj, la densa nigra hararo kaj la afabla kaj honesta vizaĝo. Ĉu li ne estas la sama junulo, kiun ŝi renkontis en Bejdajhe kiam ŝi instruis tie? Dum tiu renkontiĝo ili nur malmulte interparolis, sed tiu ĉi talenta kaj saĝa homo jam lasis en ŝi profundan impreson, kaj poste ŝi ankoraŭ lin rememoris kelkfoje. Nun, Lu Giaĉuan tamen ne rekonis ŝin, kaj ŝi, pro honto, ankaŭ ne salutis lin.

Salutinte la ĉeestantojn, li eksidis sur tabureton kaj diris al Luo Dafang ridetante:

“Nu, amiko, finrecitu vian grandan verkon! Poste mi ankaŭ dediĉos al vi ĉiuj la mian.”

“Prave. Mi daŭrigu la prezentadon!” Luo Dafang ekridis per larĝe malfermita buŝo. Li faris du tusojn por klarigi al si la voĉon kaj diris plu:

“Tiunokte, la pluvo pli kaj pli torentis. Post nia kuraĝigo, la amaso komencis kvietiĝi. En la malluma Hiaŭlingvej, vidiĝis nur unu aŭ du

lamplumaj strioj pale flagretantaj el la kazerno kaj aŭdiĝis nur la paŝado de la soldatoj ĉirkaŭe nin gardantaj, kiuj plaŭdis en la kotakvo. Subite venis ano de nia ordogarda grupo por nin informi: ‘Mi raportas! La registaro ekspedis pli ol tridek kamionojn kaj pli ol mil soldatojn kaj policanojn por devige nin resendi al Bejping!’ Pro tiu neatendita novaĵo, ni gvidis la kaptitaron krei denove.” Lia gaja voĉo nun fariĝis peza; ĝi mallaŭtiĝis, sed estis sonora kaj plena de energio. Li aldonis: “Ni kriis pli laŭte kaj pli forte ol antaŭe:

Ni nun ne deziras foriri,
Antaŭ ol liberon akiri!

Vi nin aleskortis ŝnurligitaj;
Nin resendu ankaŭ ŝnurligitaj!
Vi avidas monon, altan rangon
Kaj popolan sangon.
Ni feliĉon celas la patrian
Kaj liberon ĝian.

Ni nun ne deziras foriri,
Antaŭ ol liberon akiri!”

Luo Dafang mallaŭte kriis, svingante la pugnon. Lia vizaĝo ruĝiĝis pro emocio. Ĉiuj silente aŭskultis kaj ĉesis ridi. Varma sango bolis en la gejunuloj, kiuj najlis sian rigardon al la parolanto. Multaj paroj da okuloj estis plenaj de larmoj.

Silento denove regis en la ĉambro.

La azenvizaĝa Vang Gianfu foriris. Iom poste, la restantoj rekomencis la manĝadon, trinkadon kaj interbabiladon.

“Ankaŭ mi rakontu al vi humoraĵon,” diris Lu Giaĉuan kun rideto, ĵetinte ĉirkaŭrigardon al la ĉeestantaro. “Tiu ĉi humoraĵo, kiun mi aŭdis antaŭ nelonge, estas same admirinda kiel la trompaj vortoj de Ĉiang Kajŝek, kiu fanfarone promesis en la Centra Milita Lernejo al la kadetoj, ke la perditaj teroj estos nepre reprenitaj en tri jaroj. Kelkajn tagojn antaŭe, kiam Ĵeĥe-provinco troviĝis sub la minaco de la japanaj invadantoj, Song Ziven flugis al ĝia ĉefurbo Ĉengde. Tuj kiam li malsupreniris el la aeroplano, li faris tre fervoran kaj impresan paroladon al la garnizonaj trupoj de la provinco. Li diris: ‘Batalu nur! Mi povas aserti, ke la Centra Registaro certe vin subtenos. Kien vi iros batalante, tien mi vin sekvos. Se vi iros al la ĉielo, ankaŭ mi vin sekvos al la ĉielo; se vi iros en la maron, ankaŭ mi vin sekvos al la maro...’ Sed la unuan tagon post la eksplodo de la batalo en Ĵeĥe, kiam la malamiko ankoraŭ multe distancis de ĝia ĉefurbo, tiu altranga burokrato Song jam nerimarkite reflugis al Nankino, irinte nek al la ĉielo, nek en la maron.”

La humoraĵo de Lu Giaĉuan tamen ne kaŭzis rideksplodon kiel tiu de Baj Liping. Kontraŭe, ĝi vekis dolorajn rememorojn, kvazaŭ deŝirinte la cikatrojn kiuj kovris la malnovajn vundojn. Oni rigardis senvorte unu al aliaj. Tiel daŭris longa momento kaj fine Cuj Hiuju rompis la silenton:

“Ho ve! Se Ĵeĥe estos perditaj, la tuta nordo de Ĉinio ankaŭ...”

Hju Ning ne plu povis sin deteni. Li ŝvingis sian pugnon, ektiretis la baskangulon de Cuj kaj petis al Lu Giaĉuan:

“Frato Lu, rakontu al ni la lasttempan situacion! De kiam aperis la streĉeco, mi, mi ne havis eĉ la emon daŭre studi.”

“Jes, rakontu do, maljuna Lu!” Ambaŭ Cuj Hiuju kaj Baj Liping direktis al li siajn okulojn.

“Ne, mi ne scias pli multe ol vi,” Lu Giaĉuan skuis la kapon kaj ridetis.

“Rakontu, maljuna Lu! Rakontu! Ni ĉiuj vin petas!” Luo Dafang elkore rigardis kaj buŝsignis al li.



La estimo kaj malpacienca scivolemo, kiujn montris la gestudentoj al Lu Giaĉuan, altiris pli la atenton de Lin Daŭging. Ŝi volis proksimiĝi al li por lin saluti, sed ŝi sentis ioman honton. Ĉiu el la ĉeestantoj en la ĉambro sciis pli ol ŝi kaj kondukis malsame ol tiuj kiujn ŝi havis okazon kontakti en la pasinteco. Ili ĉiuj montris fervoron al la progreso kaj patriotisman respondecon. En tiu ĉi nova rondo, ŝi humile sidis en nehela angulo kaj kuraĝis diri nenion.

“La nuna situacio vere estas indigninda!” mallaŭte komencis Lu Giaĉuan, rigardante la aŭskultantojn. “Neniu konscia ĉino povas toleri plu. Post la Evento de la 28-a de Januaro de 1932, la registaro nur buŝe kriis pri ‘samtempe rezisti kaj trakti’, sed fakte tute ne rezistis. La kontraŭbatalo ĉe la pasejo Ŝanhajguan, kiu okazis lasttempe, daŭris ne pli ol kvin tagojn, kaj la tieaj garnizonaj trupoj de He Ĝuguo estis retiritaj laŭ ordono. La kontraŭbatalo en Ĵeĥe-provinco iris nur sep tagojn, kaj Ĉengde estis perditaj. La japanaj agresantoj estas pretaj ataki ĉiujn pasejojn de la Granda Muro...” Li elpoŝigis sian naztukon por viŝi la ŝviton sur la frunto.

Malaperis la aplombo, kiun li ĵus montris, kaj li daŭrigis per indigna kaj agita voĉo: “En tiu ĉi kriza momento de la ĉina nacio, Ĉiang Kajšek tamen diris, ke nia malamiko ne estas la japanaj agresantoj, sed la ‘komunistaj banditoj’. Anstataŭ batali kontraŭ Japanio, liaj trupoj, konsistantaj el milionoj da soldatoj, pli furioze faris ĉirkaŭekstermon al la Ruĝa Armeo kaj buĉadon al komunistoj kaj patriotaj junuloj... Sed la Ruĝa Armeo, sub la gvido de Maŭ Zedong kaj Ĝu De, jam frakasis tiun kampanjon komanditan de Ĉiang Kajšek mem, kaj gajnis grandan venkon...”

“‘Estas preferinde donaci la patrian teron al amika ŝtato ol doni al hejma servistaĉo,’” indigne kriis Hju Ning, svingante la pugnon, kaj interrompis la parolon de Lu. “He, ĉu vi scias? De tio devenas la politiko de Kuomintango: ‘Antaŭ ol kontraŭbatali la malamikon eksterlandan, necesas subpremi la enlandan!’”

La dekelkaj gejunuloj en la ĉambro komencis brue diskuti. Nur Lin Daŭging silente restis en sia angulo. Ŝi atente aŭskultis iliajn parolojn, kiu, kiel pluveroj falantaj sur soifajn plantaĵojn, estis tuj sorbitaj de ŝia malplena kaj sufokita koro, en kiu ekvibris entuziasmo neniam antaŭe de ŝi spertita. Ŝi deziregis aliĝi al tiu grupo kaj partopreni en ĝia konversacio. Tamen, pro kutimiĝo al soleco, kaj ankaŭ pro memestimo, ŝi sidis senvorte malantaŭ la aliaj, kaj neniu ŝin rimarkis.

“Frato Lu,” Hju Ning denove kriis al li. “Frato Lu, diru al ni, kion ni faru? Kie troviĝas nia elirejo?...”

Post tiu demando, ĉiuj gejunuloj en la ĉambro, inkluzive Lin Daŭging, ekturnis sian rigardon al Lu Giaĉuan, kiel se ili povus trovi en li sian elirejon. Ĉiuj mienis kun neretenebla aflikto kaj maltrankvilo.

Ĉirkaŭrigardinte al la gejunuloj, kiuj videble metis senliman esperon sur lin, kaj ankaŭ al la angulo de Lin Daŭging, Lu Giaĉuan diris per peza kaj mallaŭta voĉo:

“Vi serĉas elirejon? Jes, ni ĉiuj ĝin serĉas, la tuta Ĉinio estas serĉanta elirejon. Kie ĝi do kuŝas? Laŭ mi, la elirejo kuŝas en la rezisto, en la luktado, en la kunligo de nia persona sorto

kun tiu de la nacio kaj de la popolo. Kian elirejon povus havi la intelektuloj en la Ĉinio duonfeŭda kaj duonkolonia? Hodiaŭ ni devas atingi antaŭ ĉio la liberigon de la ĉina nacio, kaj nur tiam ni havos nian personan elirejon kaj liberigon...”

“Unue la nacian elirejon, kaj poste la personan elirejon... Prave!” Hju Ning kapjesis kaj svingis la pugnon.

“Jes, prave!” mallaŭte eĥis Cuj Hiuju, rigardante al Hju Ning.

“Sed mi ankoraŭ sentas aflikton...” iu murmuretis.

Kaj rekomenciĝis la bolado de la diskutoj.

Subite Luo Dafang saltis al la tablo kaj, dorninte manfrapon sur ĝin, kriis: “He, geamikoj! Laŭ mi, ne helpas nura teoria diskutado; ni studu nun, kiajn laborojn praktikajn kaj utilajn ni faros!” La amaso ekĉirkaŭis lin kaj daŭrigis la varman interbabiladon. Dume, Lu Giaĉuan ekstaris, nerimarkite proksimiĝis al Lin Daŭging kaj etendis al ŝi la manon.

“Ĉu vi rekonas min, Lin Daŭging?”

Ŝi tuj stariĝis kaj premis al li la manon. Ŝia vizaĝo ekruĝiĝis. “Jes. Mi vidis vin en Bejdajhe...”

“Vi transloĝiĝis al Bejping? Kiom da tempo vi forlasis Jangĝuang?” demandis Lu Giaĉuan, kun tono familiara, natura, kvazaŭ li estus ŝia malnova amiko kaj nun ŝin revidus post multjara disiĝo.

“Pli ol unu jaron. Kiel vi fartas? Ĉu vi ankoraŭ studas en la Pekina Universitato?” respondis Daŭging ridetante. Al li ankaŭ ŝi havis familieran senton de malnova amiko.

Baj Liping returnis la kapon kaj trovis ilin interparolantaj. Ŝi alpaŝis kaj interrompis:

“Ĉu vi konatiĝis jam delonge? Ho, mi tion ne atendis!”

“Ni konatiĝis antaŭ unu jaro, en grava momento kaj en ĉarma loko,” rakontis Lu Giaĉuan kvazaŭ ŝercante la pasintaĵon. “Tiun tagon, Lin Daŭging estis disputanta kun mia bofrato, tre interese. Oh, kial vi ne plu instruas tie? Kion vi faras nun?”

Lin Daŭging ekrugiĝis ĝis la oreloj. Kiama-
niere ŝi povus malkaŝi al li, ke ŝi ĉesis instrui,
ke ŝi fariĝis amatino de Ju Jongze kaj ke pro tio
ŝi havas neniun laboron? Ne, tion eldiri ŝi ne
povas. Ŝi do nur gape ridetis al li, kun vizaĝo
flamanta.

“Vi demandis pri ŝi? Ŝi havas ĉe siaj piedoj
ŝtonon, kiu baras ŝian antaŭeniradon!” Baj Li-
ping, rimarkinte ŝian ĝenatecon, grimacis al Lu



En Pekino

TIAN-ANMEN-placo situas en
la centro de Pekino. Ĉe ĝia
norda rando staras la samnoma
pordego, kiu estas la fronta pordego
de la malnova Imperiestra Palaco
de feŭdaj dinastioj. La pordego
fakte estas granda domo sur ruĝa
murego. Je la 1-a de oktobro, 1949,
sur la antikva placo kun glora
revolucia tradicio okazis la inaŭ-
gura mitingo de la fondiĝo de la
nova Ĉinio. La granda gvidanto de
la ĉina popolo Prezidanto Maŭ
Zedong solene proklamis sur la
pordego al la tuta mondo la naski-
ĝon de la Ĉina Popola Respubliko.
De post tiam la figuro de la majesta
Tian-anmen-pordego sub kvin steloj
fariĝis konsistiga parto de la ŝtata
emblemo de la Ĉina Popola Res-
publiko, kiu simbolas rejuniĝon de
la civilizita antikva lando.

Kontraŭe al la pordego, sur la
aksa linio de la placo alte staras la
Monumento de Popolaj Herooj, kies
angulŝtonon persone metis Prezidan-
to Maŭ antaŭ la tago de la fondiĝo

Giaĉuan kaj klarigis. “Eta Lin estas bona kna-
bino, aminda knabino, tamen ŝia maljuna kla-
sikisto detenas al ŝi la moviĝadon.”

“Eta Baj, eta Baj, venu ĉi tien!” vokis ŝin iu
el la amaso, kaj ŝi forlasis Lin Daŭging kaj Lu
Giaĉuan, dirinte al ili kun rideto: “Daŭrigu do
vian interparoladon, du malnovaj gekonatoj!”

Ili efektive interparoladis, dum longa tempo.

(Daŭrigota)

Tian-anmen-placo


HOŬ JENGI, profesoro de la Pekina Universitato

de la nova Ĉinio. Ĝi konstruiĝis
por memori la heroojn, kiuj oferis
sian vivon en la batalado kontraŭ
imperiismo kaj feŭdismo por nacia
sendependeco kaj libereco kaj feliĉo
de la popolo en la lastaj pli ol 100
jaroj. Sur la fronta flanko de la
monumento estas skribajo de Pre-
zidanto Maŭ “Senmortaj estas la
popolaj herooj”, kaj sur la dorsa
flanko estas teksto verkita de Pre-
zidanto Maŭ, skribita de Ĉefmi-
nistro Ĝoŭ Enlaj kaj poste ĉizita
sur ĝi.


Por la 10-a datreveno de la fon-
diĝo de la nova Ĉinio oni unufoje
plivastigis la placon, tiel ke ĝia
areo kelkoble pligrandiĝis. Sur ĝi
povas okazi mitingo kun 500,000
partoprenantoj. Okcidente de ĝi
staras la Popola Halo kaj oriente la
Muzeo de la Ĉina Historio, kiuj
ambaŭ estas grandiozaj modernaj
konstruaĵoj vizaĝe al la monumen-
to. Frue en la revoluciaj militaj
jaroj, kiam Prezidanto Maŭ estis en

Jan-an de norda Ŝenhi-provinco, li
diris: Post venko de la revolucio
ni nepre konstruos grandan halon,
kiu povas enteni dekmil homojn
por ke gvidantoj de la Partio kaj
la ŝtato kaj reprezentantoj de la
popolo povu kune interkonsiliĝi pri
gravaj ŝtataj aferoj. La Popola
Halo estis konstruita en 1959 dum
la plivastigado de la placo, kaj ĝia
konstrua areo estas pli granda ol
la utiligebla areo de la Imperiestra
Palaco.

Je la 9-a de septembro, 1976, for-
pasis Prezidanto Maŭ Zedong, la
kreinto de la Ĉina Popola Respu-
bliko. La diversnacieca popolo de
nia lando dronis en ekstrema mal-
ĝojo kaj profunde funebris pri li
ankaŭ multaj fremdlandaj amikoj.
Por ke la popolamasoj de generacio
al generacio povu vidi Prezidanton
Maŭ, karmemori lian grandan kon-
tribuon kaj ricevi forton por daŭ-
rigo de la revolucio, Prezidanto
Hua Guofeng, daŭriganto de Pre-



Tian-anmen-pordego post neĝado



Tian-anmen-pordego antaŭ la Li-berigo

zidanto Maŭ, kaj la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio decidis konstrui memorhalon de Prezidanto Maŭ en la centro de Tian-anmen-placo, sude de la Monumento de Popolaj Herooj. Post duonjara klopodo la memorhalo kun nacia stilo jam estis konstruita sur la refoje plivastigita placo.

Nun la vasta Tian-anmen-placo estas ne nur la centro de politikaj

aktivadoj, sed ankaŭ ŝatata loko de diversaj naciecoj de Ĉinio. Ĉiutage, de la mateno ĝis la nokto ĝin vizitas multaj ĉinoj kaj eksterlandaj kamaradoj kaj amikoj.

Por pli bone ekspliki ĝian profundan ŝanĝigon, ni devas refreŝigi ĝian historion.

Tian-anmen-placo iam estis kortega placo antaŭ la Imperiestra Palaco dum la feŭda periodo. Frue en la 6-a jarcento, nome en Suj-dinastio jam aperis relative kompleta projekto de ĉina kortega placo en plano de ĉefurba konstruado. Tiam la ĉefurbo de Ĉinio estis Ĉang-an (la nuna Hi-an, ĉefurbo de Senhi-provinco). Kun plurfoja translokiĝo de la ĉefurbo fare de feŭdaj dinastioj, la projekto de la kortega placo ankaŭ senĉese pliboniĝis. En la komenco de la 15-a jarcento, kiam la ĉefurbo de Ming-dinastio translokiĝis al Pekino, Tian-anmen-placo jam konstruiĝis en simpla formo. Poste King-dinastio (1616-1911 p.K.) faris malmultan plivastigon al ĝi, kaj fine fariĝis plej kompleta el ĉiuj kortegaj placoj de ĉefurboj de feŭdaj dinastioj.

Projektante kortegan palacon oni rezervis spacon antaŭ la palaco, por ke la altaj domegoj donu al preterpasantoj misterajn sentojn kaj manifestu absolutan potencon de imperiestro. Tiam la reganta klaso volis per tio trompi la popolon. Dum Ming- kaj King-dinastioj la kortega placo de la urbo Pekino estis en la formo de T kaj ĉirkaŭita de ruĝa murego, por malpermesi al popolanoj eniri ĝin. En la orienta kaj okcidenta flankoj interne de la muroj estis simetrie konstruitaj du malaltaj simplaj koridoroj. En la mezo inter ili estis "imperiestra vojo", kiu rekte kondukis al Tian-anmen-prodego. Kontraste kun la longaj koridoroj, Tian-anmen-por-

dego ĉe la tino de la vojo aspektas ekstreme grandioza kaj alta.

La imperiestroj de Ming- kaj King-dinastioj ludis artifikojn sur la placo por trompi la popolon kaj manifesti sian potencon. Ekzemple, tiam modiĝis ŝtata ekzameno — sistemo por subaĉeti intelektulojn, kiuj ĉasis renomon kaj profiton, ke ili lojale servu al la reganta klaso. La nomoj de la sukcesintoj en la ekzameno estis skribitaj sur speciale farita flava listo, kaj en solena ceremonio oni sendis ĝin tra Tian-anmen-pordego kaj algluis sur la muro ekster la orienta pordo. Depost tiu tago, la sukcesintoj komencis sin vicigi inter la superan tavolon de la reganta klaso kaj havigi al si altan oficon kaj ĝui luksan vivon. Dume, en ĉiu aŭtuno, antaŭ la koridoro interne de la okcidenta pordo regantoj juĝis "krimulojn" minacantajn al regado de la dinastio kaj poste ekzekutis ilin. Preskaŭ ĉiuj homoj, kiuj eskortiĝis en la pordon, estis mortigitaj. Utiligante la placon la feŭdaj imperiestroj aplikis la du rimedojn kontraŭ la popolamasoj. Lusin, granda verkisto de Ĉinio, rigardis tiujn farojn kiel molan kaj malmolan glavojn.

En Ming- kaj King-dinastioj, kiam imperiestroj surtroniĝis aŭ difino de ilia edzino estis dekretita, oni okazigis gratulan ceremonion sur Tian-anmen-pordego. Kiam la ceremonio komenciĝis, ĉiuj altarangaj mandarenoj kaj generaloj genuiĝis antaŭ la pordego kaj esprimis siajn gratulojn. En muziko la imperiestra dekreto estis transdonita al la oficejo de kortega ceremonio por kopii sur flavaj paperoj kaj poste distribuita al diversaj lokoj de la lando. Ĉio ĉi montris nenion alian ol tion, ke feŭda imperiestro estas "Filo de la Ĉielo" kaj tute diferencas de la pleboj.

*Tian-anmen-placo kun
la Memorhalo de Pre-
zidanto Maŭ en la
centro*



Tamen, laŭdire, sur la placo, kiu simbolis absolutan potencon de imperiestro, Li Ziceng, gvidanto de la kamparana revolucio en la fino de Ming-dinastio, streĉis sian pafarkon kaj forte pafis sagon al la horizontala tabulo super "Ĉengtianmen" (la poste alinomita Tian-anmen en King-dinastio), kiam la insurekcia armeo sturmis en la urbon Pekino. Sub la peza bato de la kamparana armeo Ming-dinastio estis renversita.

La historia evoluo estas nehaltigebla. Same kiel Ming-dinastio, ankaŭ King-dinastio pereis. En la jaro 1911, la revolucia movado gvidita de Sinjoro Sun Jatsen, pioniro de la ĉina revolucio, eksplodis en formo de arma insurekcio en la urbo Vuĉang de Hubej-provinco, kaj per tio finis la feŭdan regadon de pli ol 2,000 jaroj en nia lando. De tiam la kortega placo antaŭ Tian-anmen-prodego estas malfermita kaj fariĝis grava trapasejo en Pekino.

Malfeliĉe, ke kvankam la regado de imperiestro estis renversita, tamen la feŭdaj fortoj profunde radikigintaj uzurpis la frukton de la revolucio kaj komplotis kun imperiismo por subpremi kaj ekspluati la ĉinan popolon. Tio incitis la ĉinan popolon al pli firma opono kontraŭ ili. Precipe sub influo de la Granda Oktobra Revolucio de Rusio, la studenta movado eksplodis en Pekino je la 4-a de majo de 1919. La "Movado je la 4-a de Majo", kiu malfermis novan epokon de la historio, ĝuste estis komencita sur Tian-anmen-placo. Tiam revoluciaj amasoj kun junaj studentoj de la Pekina Universitato kaj aliaj altlernejoj kiel pioniroj kunvenis sur la placo, okazigis grandskalan manifestacion kaj laŭte kriis revoluciajn sloganojn pri opono kontraŭ imperiismo kaj feŭdismo. De tiam komenciĝis la nov-demokratia revolucio de nia lando. La placo iom post iom fariĝis la revolucia centro de la pekinaj revoluciaj amasoj en batalado kontraŭ imperiismo kaj

feŭdismo antaŭ la liberiĝo de Pekino.

Post la Liberiĝo, precipe en la lastaj jaroj, dank' al plivastigado kaj reformo de la placo, ĝi fariĝis popola placo de socialisma epoko. Kontraste kun la placo, la Imperiestra Palaco ŝajne jam fariĝis ĝia "posta korto". Nun la Memorhalo de Prezidanto Maŭ majeste staras sur la placo, kio ne nur novigis ĝian tutan aspekton, sed ankaŭ atribuis al ĝi pli gravan politikan signifon. La denove riparita Ĝengjangmenpordego en la suda ekstremo de la placo estis nove vestita. Sur la norda muro de Ĝengjangmen estas skribitaj la grandaj ideogramoj "Daŭrigu la aferon postlasitan de Prezidanto Maŭ kaj konduku la proletan revolucionan aferon ĝis la fino". Tio estas la alvoko de la Centra Komitato de KPC kun Prezidanto Hua kiel la estro, kaj ankaŭ la firma ĵuro de la ĉina popolo. La placo certe ĉiam pli brilas kun progresado de la proleta revolucia afero de nia lando.



Vizito al Brita Sciencisto Doktoro Joseph Needham

de Sun Venfang

ANTAŬ nelonge, mi vizitis, kune kun ĉinaj sciencistoj, fame konatan anglan scienciston Doktoron Joseph Needham en la Universitato Kembriĝo.

Doktoro Joseph Needham, aŭtoro de la ampleksa verko «Historio de la Ĉinaj Sciencoj kaj Teknikoj», estas malnova amiko de la ĉina popolo. Frue en la periodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito li venis al Ĉinio kaj sin okupis pri scienca laboro kaj starigis intiman interrilaton kun ĉinaj sciencaj rondoj. Kiam li estis revenonta al sia hejmlando en 1946, iuj progresaj personoj de ĉinaj sciencaj rondoj laŭdis lin per jenaj vortoj: “Li estas eminenta

en scienca studo, fekunda en verkado, sincera kaj ĝentila en socia vivo. . . kaj kun intereso pri la historio de la ĉinaj kulturo kaj scienco.” Ili dankis lin, pro ke li helpis ĉinajn sciencistojn en malfaciloj de militado solvi problemojn de sciencaj materialoj kaj instrumentoj. Post la Liberigo de nia lando, Joseph Needham plurfoje vizitis Ĉinion kaj nia Ĉefministro Ĝou Enlaj intervidiĝis kun li. Precipe en la periodo de la Korea Milito, kiam la usona imperiismo jetis bakteriajn bombojn en Koreio, biologo Joseph Needham, kiel membro de la Internacia Enketa Komitato, persone venis al norda Koreio por fari esploron. Malgraŭ minaco

de imperiismo li malkaŝis, al la tuta mondo, krimojn de bakteria militado fare de la usona imperiismo. Nun, li ankoraŭ entuziasme laboras kiel prezidanto de la Societo por Brit-Ĉina Kompreno.

Ĉifoje ni intervidiĝis kun li en la Biblioteko de la Ekstremaorienta Scienca Historio, lastatempe starigita de li. Li estas la estro de la biblioteko. Ĝi entenas ĉ. dekmil librojn eldonitajn de Ĉinio kaj aliaj landoj pri ĉinaj industrio, agrikulturo, medicino, matematiko, astronomio, geografio, literaturo, historio, filozofio, militaj aferoj k.a. el kiuj multaj trezoraj libroj estis kolektitaj de li en multaj jaroj. Nun li kaj liaj asistantoj diligente esploras kaj revizias la verkon «Historio de la Ĉinaj Sciencoj kaj Teknikoj». Li tre ĝojis pro la alveno de ĉinaj sciencistoj kaj aparte elprenis ĉinajn teon kaj bombonojn por regali ilin. Li fervore demandis la lastatempajn vivstaton de liaj malnovaj amikoj Guo Moĵuo, Kian Sankiang kaj Jan Gici. La interparolo nature turniĝis al la verkado de la «Historio de la Ĉinaj Sciencoj kaj Teknikoj». La ampleksa verko havas sep volumojn kun milionoj da vortoj. De 1954, jam eldoniĝis unu post alia 1-4 volumoj, kiuj prezentis ĝeneralan bildon pri la disvolviĝo de la ĉinaj sciencoj kaj teknikoj, la estiĝon kaj evoluon de sciencaj pensoj, atingojn de la antikva Ĉinio en matematiko, astronomio, geoscienco, fiziko, meĥani-

D-ro Joseph Needham (la dua de dekstre) prezentas al la ĉina metalurgia kemiisto Prof. Si Sengtaj en vizito al la Universitato Kembriĝo historian materialon pri ĉinaj sciencoj kaj teknikoj.



ko, konstruado, akvoutiligo kaj navigado. Iuj el la 1-4 partoj de la 5-a volumo pri kemio jam estas eldonitaj kaj la aliaj aperos baldaŭ. Nuntempe li kaj liaj asistantoj estas esplorantaj kaj kompilantaj la aliajn partojn. Interalie la medicina parto pri akupunkturo jam estis finskribita kaj unue aperos en aparta broŝuro kaj poste kiel parto de la tuta verko. La parto pri botaniko estas preskaŭ kompletigita. Ĝis nun, ĉirkaŭ tri kvinonoj de la tuta verko estis finskribitaj aŭ eldonitaj. Joseph Needham montris al ni la aperintajn volumojn en la angla, ĉina kaj aliaj lingvoj kaj recenzojn pri ĝi aperintajn en ĵurnaloj kaj gazetoj de diversaj lokoj de la mondo. Li havas asistanton, kiu speciale zorgas pri la leteroj pri la verko el diversaj lokoj de la mondo. En la lastaj jaroj li estas invitita al iuj eŭropaj kaj amerikaj landoj por fari paroladojn pri la ĉina antikva civilizacio. Tio pruvis, ke la libro «Historio de la Ĉinaj Sciencoj kaj Teknikoj» de Joseph Needham jam ricevis ĝeneralan atenton de la mondo.

En la tridekaj jaroj Joseph Needham jam havis la ideon skribi la libron «Historio de la Ĉinaj Sciencoj kaj Teknikoj». Tiutempe la malnova Ĉinio estis malestimata de okcidentaj landoj. Iuj burĝaj aŭtoritatoj asertis arbitre: «En Ĉinio tute ne troviĝis scienco kaj tekniko». Post unuapaŝa enketo, Joseph Needham trovis ke tiu opinio estas tute erara. La ĉinaj antikvaj astronomio, medicino kaj navigacio estis samnivelaj kun tiuj de la okcidentaj landoj. Ĉinio plej frue inventis kompason, paperon, pres-teknikon kaj pulvon. En tre longa historio, Ĉinio faris sian kontribuon en diversaj flankoj de scienco por la monda civilizacio. Por korekti antaŭjuĝojn de iuj homoj pri Ĉinio kaj redoni la veran fizionomion de

Diverslingvaj tradukoj de la "Historio de la Ĉinaj Sciencoj kaj Teknikoj"



ĉina antikva civilizacio, Joseph Needham decidis verki libron pri la ĉinaj antikvaj sciencoj kaj teknikoj. Sed, tiutempe li intencis skribi nur 1-2 broŝurojn. Por studi la ĉinan riĉan kulturon li komencis lerni la ĉinan lingvon en sia 37-jara aĝo. Dum la periodo de la Dua Mondmilito, li laboris kelkajn jarojn en Ĉinio, kie li akiris helpon de multaj ĉinaj sciencistoj kaj kolektis kaj akumulis nemalmultajn materialojn, kiuj metis bazon por poste verki la libron.

La verkado de la libro «Historio de Ĉinaj Sciencoj kaj Teknikoj» estis komencita post 1945. Tiam Doktoro Joseph Needham laboris kiel instruisto en la Universitato Kembriĝo kaj li devis studi kaj verki en ĉambreto dum postlaboraj horoj, ĉe manko de materialo, monrimedo kaj asistanto. La manuskriptoj de la unuaj du volumoj estis tajpitaj de li sur uzitaj paperoj. Li diligente laboris kaj peneme esploris dekojn da jaroj. Por akiri ĝustan sciencan ateston li legis grandan nombron da libroj eldonitaj de diversaj landoj, kaj interkonsiliĝis kun koncernaj specialistoj. Dum esplorado, li trovis, krom la konataj inventoj de antikvaj ĉinaj sciencistoj, multajn sciencajn atingojn nekona-tajn. Ekzemple, oni nur scias, ke en la fino de la 18-a jarcento la

anglo Edward Jenner trovis bovinan vakcinon por preventi vario-lon, sed ne tion ke en la 16-a jarcento en ĉina medicina libro jam troviĝis noto pri prevento de malsano per metodo simila al uzo de bovina vakcino. Sekve de lia ĉiam pli profunda esplorado, la verko plivastiĝis iom kaj iom ĝis la nuna granda amplekso.

Doktoro Joseph Needham estas membro de la Reĝa Societo de Londono por Utiligo de Natura Scio. Je la 9-a de decembro, 1977 la 77-a datreveno de lia naskiĝo Joseph Needham venis al la Londona Reĝa Instituto laŭ invito kaj faris raporton pri kontribuo de Ĉinio al la mondaj sciencoj kaj teknikoj kaj estis varme bonvenigata de la aŭskultantoj. Por plene sin dediĉi al la verkado de la «Historio de Ĉinaj Sciencoj kaj Teknikoj», li ekŝiĝis, en 1976, de la prezidanteco de la Instituto Gonville kaj Caius de la Universitato Kembriĝo. Kvankam li jam estas grandaĝa, tamen li estas tre sana kaj ĉiutage ankoraŭ povas labori 13-14 horojn. Lia plej granda deziro estas fini la verkon en la restaj jaroj.

Kiam ni adiaŭis lin, li persone akompanis nin al la hotelo kaj petis ke ni transdonu liajn bondezi-rojn al ĉinaj sciencistoj.

63-a UK de Esperanto okazos en Varna (Bulgario), 29 jul. — 5 aŭg. 1978.

Konstanta adr.: Nieuweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Adr. de Loka Kongresa Komitato: Bul. Ĥristo Botev 97, BG-1303 Sofia.

Esperantologia Konferenco okazos en la kadro de la 63-a UK sub organizo CED kun la celo resumi per prelegoj kaj laŭ seminario la nunan esplor-staton de esperantologio kaj montri la direkton de estonta esplorado. Estas projektataj prelegoj pri la valoro de Esperanto por la moderna lingvoscienco; la nuna stato de la scienca analizo de Esperanto; la direkto, laŭ kiu la internacia lingvo evoluas; esperantaj terminologioj, ktp.

En 1978 Jugoslavia Esperanto Revuo "Voĉo" solene festos sian jubileon — 5-jarojn de regula aperado kaj tiu-okaze estos aranĝita E-eks-

pozicio. Redakcioj de E-gazetoj kaj E-eldonistoj kaj unuopuloj estas petataj sendi gratulojn kaj aliajn E-materialon uzeblan por ekspozicio al adreso: Jugoslavia Esperanto Revuo "Voĉo", Ŝkolska ul. 25, 56227 — Borovo, Jugoslavio.

Kontribuantoj ricevos belan koloran dank-pki.

Lingvaj Problemoj kaj Lingvo-plano komencas aperi kiel sekvulo de "la monda lingvo-problemo", kies 6-an volumon kompletigis la lasta numero (18) aperinta antaŭnelonge. La novulo estas same plurlingva sed prezentas en Esperanto resumon de ĉiu artikolo. 53 fakuloj jam eniris en ĝian redaktan komitaton. La revuo estas subteninda, ĉar ĝi estas tute faka, profesia kaj unika en sia speco. Ĝia redaktoro (prof. Richard E. Wood, Departemento of Foreign Languages, Plymouth State College, Plymouth, New Hampshire 03264, Usono) invitas al kunlaboro sendi

eltondadojn pri lingvaj problemoj el la monda gazetararo kaj abonigi bibliotekojn al la revuo. Abonkotizo por unu volumo: 33 gld. UEA akceptas abonon por tiu revuo.

Someraj Universitataj Kursoj ĉi-jare okazos en Lieĝo (Belgio) inter la 6a kaj 27a de aŭgusto, kun lekcionoj pri astronomio, psikologio kaj literaturo. Pliajn informojn oni petu ĉe SUK, B.P. 9, B-4000 Lieĝo, Belgio, kie oni povas mendi ankaŭ la kurslibrojn de la antaŭaj sesioj de SUK.

Ekaperis "Interfake", komuna bulteno de ĉiuj fakaj asocioj. Ĝi estas rezulto de la asembleo de fakaj asocioj okazinta dum UK en Rejkjavik. La bulteno ne celas sole disvastigi informojn, sed ankaŭ interŝanĝi spertojn kaj konkretigon de la solidareco inter fakaj asocioj. La unua numero entenas protokolon de la asembleo de fakaj asocioj okazinta en Rejkjavik. Redaktoro: Francois Lo Jacomo, 14 rue de la Pompe, F-75016 Paris.

La moderniga movado de 1898

de SI GIN



POST la Ĉina-Japana Milito de 1894, diversaj imperiismaj landoj ĉiam pli intensigis sian agreson al Ĉinio, la King-dinastia registaro putris tagon post tago kaj Ĉinio alfrontis la danĝeron esti dismembrigita de imperiismaj potencoj. Por savi la nacion kaj ŝanĝi la ekzistantan staton, la ĉina nacia burĝaro levis reformisman mo-

vadon, kiu atingis altan tajdon en 1898.

Por pluapase agresi Ĉinion, imperiismo aplikis diversajn metodojn, precipe okupi havenojn kiel bazlokojn, penetri profunde en la internon per fervojoj k.a., kaj dividi la ĉinan teritorion en diverslandajn influferojn. Ekzemple, Francio per-

forte okupis la Guangĝou-an Golfon kaj prenis la provincojn Junnan, Guangdong kaj Guanghi kiel sian influferon; Germanio okupis la Giaŭĝou-an Golfon kaj prenis Ŝandong kiel sian influferon; la cara Rusio okupis Ljuŝun kaj Dalian kaj prenis nordorientan kaj nordan Ĉinion kiel sian influferon; Britio okupis Giulong, Vejhajvej

kaj prenis la basenon de Jangzivero kiel sian influferon; Japanio ricevis de Ĉinio garantion, ke Fugian neniam estos koncesiita al aliaj landoj.

Vizaĝe al la danĝero de dismembrigo, Kang Joŭvej, Liang Kiĉaŭ, Tan Sitong, Jan Fu kaj aliaj reprezentaj personoj de la reformisma movado de la ĉina burĝaro opiniis, ke por savi la nacion konstitucia reformo nepre devas esti farita kaj por fari konstitucian reformon oni nepre devas lerni de kapitalismaj landoj. Ili asertis, ke oni devas ŝanĝi la ekzistantan staton, efektivi konstitucian monarkion kaj disvolvi kapitalismon. De 1888 ĝis 1898, Kang Joŭvej sepfoje skribis al Imperiestro Guanhju por postuli konstitucian reformon. Li montris: "Se oni reformos, la nacio restos viva, alie ĝi pereos." Ili intencis riĉigi Ĉinion per disvolvo de kapitalismo tra la reformisma vojo de konstitucia reformo kaj modernigo por oponi kontraŭ agreso kaj dismembrigo de imperiismaj landoj al Ĉinio kaj rezisti kontraŭ la popola revolucio.

Frue en aprilo de 1895, kiam la japana imperiismo devigis la registaron de King-dinastio subskribi naciperfidan «Traktaton de Ŝimonoseki», Kang Joŭvej skribis, kun pli ol 1,300 kleruloj, kiuj venis de diversaj provincoj de la tuta lando al Pekino por partopreni en la tutlanda ekzameno, al Imperiestro Guanhju por oponi kontraŭ la subskribado kaj peti konstitucian reformon. Pro malhelpo de obstinaj korteganoj ili ne sukcesis, tamen, la ideo de konstitucia reformo de Kang Joŭvej estis multe disvastigita.

Por disvastigi kaj propagandi la ideon de modernigo, la reformistoj organizis ligojn, starigis lernejojn kaj eldonis ĵurnalojn kaj gazetojn.

En julio de 1895, Kang Joŭvej kaj lia lernanto Liang Kiĉaŭ eldonis en Pekino la gazeton «Kroniko de Ĉinio kaj Fremdaj Landoj», kaj poste fondis kune kun burokratoj de la imperiestra partio la "Fortigan Ligon", kiu periode kunvenis, lekcis, eldonis librojn kaj gazetojn por diskonigi la okcidentan kulturon. Ankaŭ en aliaj lokoj oni starigis lernejojn, inter kiuj la plej fame konata estis la Ĉangŝa-a Moderna Lernejo fondita de Tan Sitong k.a. Tiamaniere la movado de konstitucia reformo rapide disvolviĝis tra la tuta lando.

Antaŭ la Ĉina-Japana Milito de 1894, interne de la reganta klaso de King-dinastio iom post iom intensiĝis la konflikto inter la partio kun Imperiestro Guanhju kiel la ĉefo kaj tiu kun la imperiestra patrino Cihj kiel la ĉefo. La lasta tenis en siaj manoj la potencon de la registaro de King-dinastio. Post la Milito de 1894, alfrunte al la danĝero de ŝtata pereco, la imperiestra partio iom post iom proksimiĝis al la reformistoj kun la celo forpreni la regpotencon el la manoj de la partio de la imperiestra patrino per konstitucia reformo. Kaj reformistoj songis efektivi konstitucian reformon sin apogante sur la politika potenco de la Imperiestro.

En novembro de 1897, Germanio perforte okupis la Giaŭĝoŭ-an Golfon. Kang Joŭvej refoje skribis al Imperiestro Guanhju kaj montris ke Ĉinio jam alfrontis la danĝeron esti dismembrigita, kaj deziris rapide efektivi konstitucian reformon. En aprilo de 1898, Kang Joŭvej kaj Liang Kiĉaŭ starigis en Pekino la Ŝtatprotektan Ligon kaj elmetis la sloganon "savi la nacion de pereco". Tiam la voĉo por konstitucia reformo fariĝis plej laŭta.

La Imperiestro Guanhju decidis fari konstitucian reformon kaj persone interkonsiliĝis kun Kang Joŭvej pri la paŝoj farotaj pri konstitucia reformo kaj instalis reformistojn en gvidaj postenoj. De la 11-a de junio ĝis la 21-a de septembro, la reformistoj faris unu post alia multajn dekretojn de konstitucia reformo kun permeso de Imperiestro Guanhju. La ĉefa enhavo de ili estis abolicii formulan verkadon, reformi la tutlandan ekzamenan sistemon, starigi lernejojn por lernado de la okcidenta kulturo; premii novajn verkojn, novajn inventojn kaj fondon de ĵurnaloj kaj gazetoj; kuraĝigi skribadon al la imperiestro aŭ registaro pri ŝtataj aferoj; protekti kaj premii agrikulturon, industrion kaj komercon, konstruadon de fervojoj kaj minekspluatadon; trejni teran kaj maran armeojn per nova metodo; reformi la burokratan organizon kaj eksigi nebezonatajn oficistojn k.a.

La dekretoj pri konstitucia reformo estis elmetitaj de Imperiestro Guanhju kun la premiso protekti la feŭdan regadon, sed la obstinularo kun la Imperiestra Patrino Cihj kiel la ĉefo rigardis ilin kiel terurajn monstrojn kaj elmetis la reakcian opinion "prefere lasi la nacion pereci ol fari konstitucian reformon". La Imperiestra Patrino Cihj instalas konfidenculon Ĵonglu kiel komandanton de armeo por regi Pekinon kaj subpremi, je oportuna ŝanco, la movadon de konstitucia reformo.

Kang Joŭvej ricevis de Imperiestro Guanhju sekretan ordonon preni rimedon kontraŭ tio kaj kaŝe sendis Tan Sitong al Juan Ŝikaj, subulo de Ĵonglu, por mortigi Ĵonglu per la armeo de Juan Ŝikaj kaj savi sin el la danĝero. Sed vidinte ke forto de la obstinularo estas granda, Juan Ŝikaj, kiu estis

tre ruza karieristo kaj spekulacie aliĝis al la Fortiga Ligo, formale konsentis kunagi sed kaŝe perfidis la sekreton al Ĵonglu.

Je la 21-a de septembro, la Imperiestra Patrino Cihî faris puĉon, malliberigis Imperiestron Guanghai, nuligis la dekretojn pri konstitucia reformo kaj arestis personojn kiuj pledis por konstitucia reformo. Kang Joŭvej kaj Liang Kiĉaŭ fuĝis eksterlanden kaj Tan Sitong k.a. estis mortigitaj. Malsukcesis la movado de konstitucia reformo, kiu daŭris de la komenco ĝis la fino 103 tagojn.

La reforma movado rompis la situacion de malpermeso al la po-

polo diskuti ŝtatajn aferojn. La debato inter la reformistoj kun okcidentaj ideologiaj influoj kaj la obstinularo kun feŭda ideologio estis akra batalo en la moderna ideologia historio de Ĉinio. Prezidanto Maŭ montris: "Tiam, la ideologio de t.n. nova lernajo ludis revolucionan rolon en batalo kontraŭ la ĉina feŭda ideologio kaj servis al la ĉina burĝ-demokratia revolucio de la malnova periodo." Kang Joŭvej, Jan Fu kaj aliaj estis reprezentantoj de tiamaj progresemaj ĉinoj kiuj lernis de la Okcidento.

La burĝaj reformistoj deziris ŝanĝi la ekzistantan staton per konstitucia reformo, savi la nacion kaj konduki Ĉinion sur kapitalis-

man vojon. Tio havis progresan signifon en la tiamaj historiaj kondiĉoj. Sed la reforma movado de 1898 estis politika movado kiu apartiĝis de la vastaj popolamasoj. Kang Joŭvej kaj aliaj revis disvolvi kapitalismon sinapogante sur la imperiestro sen efektiva potenco kaj bari revolucionan movadon de la popolaj amasoj per iom da reformo al la feŭda sistemo. Tio decidis la fatalan fiaskon de la reforma movado. La malsukceso de la movado ankaŭ pruvis, ke en la duonkolonia kaj duonfeŭda Ĉinio la reformista vojo estis netrapasebla. Male, Jihetuan-movado de 1900 estis vere ĝisfunde revolucia amasa movado kontraŭ imperiismo.



PAŬLOVONIO RAPIDEGE KRESKANTA

En la urbo Gujlin de la Guanghi-a Ĝuang-nacieca Aŭtonoma Regiono oni trovis rapide kreskantan paŭlovnion (*paulownia tomentosa*). Tiun arbon plantis apud dome laboristoj de la brikfarejo de tiu urbo en marto de 1968. La Ĉina Agromia kaj Forstokultura Akademio kaj la Guanghi-a Forstokultura Instituto konstatis per mezurado, ke tiu arbo altas 20.8 metrojn, dikas, je brustoalteco, 77.6 centimetrojn kaj povas doni 3.66 kubmetrojn da ligno.

Paŭlovnio kreskas rapide kaj povas liveri bonan lignon taŭgan por farado de aviadiloj, ŝipoj kaj belaj mebloj. Ĝia ligno estas ankaŭ grava speco de eksporta materialo. La malkaŝo de la supre menciita arbo ŝanĝis la rutinan opinion, ke paŭlovnio povas rapide kreski nur en norda Ĉinio, kaj aldonis novan specion de rapide kreskantaj arboj en la Sudo.

GRANDA LEGOMFORCEJO FINKONSTRUITA

Granda moderna legomforcejo estas finkonstruita kaj komencis produktadon en antaŭurbo de Pekino.

La nomita forcejo havas malpezan ŝtalan framon. Instaligis en ĝi radiatoroj, ventoliloj kaj irigaciaj ŝprucigiloj kaj gutigiloj. La vojo en la forcejo povas trapasigi malpezajn kamionojn. Tiu forcejo kun longeco de 300 metroj, larĝeco de 63 metroj kaj alteco de 2.25 metroj (3.3 metroj je la firsto) havas legombedaron kun areo de preskaŭ du hektaroj. En servo al la pro-

duktado de la forcejo troviĝas dependaj konstruaĵoj kiel kaldronegejo, elektrodistribuejo, oletenejo kaj centro de aŭtomata direktado.

Tia granda moderna forcejo povas produktadi legomojn tutjare en stabila alta produktokvanto, malgraŭ ventego, hajlo k.s., per relative malmulte da laboruloj.

SEKA DOKO POR 50,000- TONELAJ ŜIPOJ

La unua seka doko por 50,000-tonelaj ŝipoj projektita kaj konstruita de nia lando jam komencis funkcii en Ŝanhajuan-Ŝipfarejo. Je la fino de la pasinta jaro, la oleŝipo Daking N-ro 65 kun kapacito de 24,000 toneloj estis prove riparita en ĝi kaj poste la ŝipo navigis el la doko en la lasta januaro por provnavigado. Pruviĝis, ke la riparado estis bonkvalite plenumita.

La finkonstruo kaj ekfunkcio de tiu seka doko akcelos la disvolvon de industrio de farado de grandaj ŝipoj kaj la aferon de mara transportado de nia lando.



La Nankina Pontego super Jangzi-rivero



La Fame Konata Urbo Nankino


Nankino situanta ĉe la malsupra parto de Jangzi-rivero estas ĉefurbo de Giangsu-provinco kaj havas historion de pli ol 2,000 jaroj.

De la 3-a jarcento ĝis la komenco de la 15-a jarcento, ok feŭdaj dinastioj prenis, unu post alia, Nankinon kiel sian ĉefurbon. La fame konata kamparana movado Tajping-a Ĉiela Regno prenis ĝin kiel sian ĉefurbon. La ĉina granda revolucia pioniro Sun Jatsen starigis sian provizoran registaron en Nankino post la Revolucio de 1911. Ĉiang Kajsek prenis Nankinon kiel la centron de la 23-jara reakcia regado de Kuomintango, kiu portis al la popolo profundan mizeron.

En aprilo 1949, la Popola Liberiga Armeo transpasis Jangzi-riveron kaj liberigis Nankinon. En la pasintaj pli ol 20 jaroj, sub la direktado de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ Nankino havis grandajn sukcesojn en la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado, kaj la antikva konsumata urbo jam fariĝis nova industria urbo.

Nun ĝi havas pli ol 1,500 entreprenojn de karbo, petrolo, maŝinoj, aŭtoj, metalurgio, kemio, telekomuniko, mezuraj instrumentoj, kemia fibro kaj aliaj, kies totala produkta valoro estas preskaŭ centoblo de tiu en la komenca periodo post la Liberiĝo.


Ankaŭ la kultura, eduka kaj higiena aferoj ricevis certan disvolviĝon. En la komenca periodo post la Liberiĝo, la urbo havis nur 5 altajn lernejojn, pli ol 70 mezajn lernejojn, pli ol 700 elementajn lernejojn kaj 7 hospitalojn;



La Maŭzoleo de Sun Jatsen


nun ĝi jam havas 14 altajn lernejojn, pli ol 340 mezajn lernejojn, pli ol 1,500 elementajn lernejojn kaj 107 hospitalojn, inkluzive de tiuj de la komunumoj.


Post la Liberiĝo, la urbo spertis grandskalan reformadon kaj ĝiaj famaj pitoreskejoj kaj historiaj lokoj estis bone protektataj kaj riparitaj. En la pasintaj pli ol 20 jaroj oni plantis multajn arbojn, la forstumita areo en la komenca periodo post la Liberiĝo estis malpli ol 2,000 hektaroj, sed nun estas pli ol 6,100 hektaroj. Krome, en la urbo oni ankoraŭ konstruis ĉefajn trafikajn vojojn kaj stratinterkruciĝajn placojn borderitajn de arboj, kaj rekonstruis 18 parkojn, inkluzive de la Maŭzoleo de Sun Jatsen, la Martira Maŭzoleo de Juhuataj, Hju-anvu-lago, Moĉoŭ-lago kaj Bajluĝoŭ.



La Ziginŝan-a Observatorio de la Ĉina Akademio de Sciencoj

La Parko de Hjuanvu-lago





Aviadilo ŝprucigas insekticidon super la forstozono ĉe la montpiedo de Ziginŝan.



Esploranto de la
Ĝongŝan-a Botanika
Instituto Ma Hua
(meze) esploras
varion de plantoj.

Konduku la proletan revolucian aferon ĝis la fino, alte tenante la grandan standardon de Prezidanto Maŭ!




La popola konstitucio



Nepre efektiviĝu la modernigo de agrikulturo, industrio, nacidefendo, scienco kaj tekniko

Je la 26-a de februaro, la Ministerio de Poŝto kaj Telekomuniko emisiis tripecan kompletan da poŝtmarkoj, por memori la triumfan kunvokiĝon de la Kvin Tutlanda Popola Kongreso de la Ĉina Popola Respubliko.





La Ensemblo de Orientaj Dancoj kaj Kantoj fondiĝis je la 13-a de januaro, 1962. Ĝia ĉefa tasko estas prezentado de niaj eminentaj popolaj dancoj kaj kantoj kaj prezentado de tiuj de aziaj, afrikaj kaj latinamerikaj landoj.

En la jaroj post sia fondiĝo, la ensemblo lernis, ordigis kaj prezentis pli ol 100 dancojn kaj pli ol 80 muzikaĵojn de aziaj, afrikaj kaj latinamerikaj landoj. Ĝia eksterlanda prezentado faris kontribuon por akceli kulturen interŝanĝon kaj pliigi la interkomprenon kaj amikecon inter la ĉina kaj alilandaj popoloj.

Ĉefministro Ĝou Enlaj tre zorgis pri ĝia kreskado. La "kvarpersona bando" freneze kontraŭstaris al la revolucia literatura kaj arta linio kaj la revolucia diplomacia linio de Prezidanto Maŭ kaj senbride opoziciis al Ĉefministro Ĝou, tial ili malpermesis al la ensemblo fari prezentadon. Post frakaso de tiu damninda bando, la ensemblo restariĝis oficiale sub la zorgo de Prezidanto Hua kaj la Centra Komitato de la Partio kaj faris prezentadon en Pekino, kio ricevis varman bonvenigon de la popolamasoj.

Pompaj Orientaj Dancoj kaj Kantoj

La tradicia "Bovla Danco" de ĉina mongola nacimalplimulto



Danco de Nepalo "Kvin Laŭdoj"






Danco "Prezidanto Hua Gvidas Nin en Venka Marŝo"



Tamila "Pota Danco" de Srilankao



"Piedsonorila Danco" de Bengaldeŝo



Popola danco de Jagi de Japanio


RANO-FRATETO

Teksio de Jue Ven

Bildoj de Fang Fang



1 Antaŭe vivis du ranoj-fratoj. Ili ofte kune naĝis, saltis kaj ekzercis sin en kapto de insektoj. Ili helpis unu la alian kaj kune vivis harmonie.



2 Foje, la rano-frateto kontuzis al si la kapon en saltado. De tiam li timis doloron kaj penon kaj ne plu volis sin ekzerci.



3 La rano-frateto fariĝis maldiligenta. Li dormis ĝis la suno leviĝis alte, kaj ankoraŭ ne volis ellitiĝi. Kiam la pliaĝa frato vekis lin, li tre malkontentiĝis.



4 Iutage, la frato kaptis insektojn kune kun la frateto surkampe. La rano-frateto rampis nerimarkite en truon de kampomuso.



5 La truo estis tre malpura kaj en ĝi gutis akveroj. La frateto dormetis en amaso de putraj herboj.



6 Kampomuso venas kunportante ŝtelitan sakon da greno. Vidinte la rano-frateton, li diras al la lasta: "Ne malkaŝu tion al aliuloj!"



7 La kampomuso alportis bongustajojn kaj diras al ĝi: "Kiom komforte! Restu kun mi ĉi tie!"




8 La pliĝa rano serĉis la frateton. Li demandis onklinon Ansero kaj fratinon Leporo, sed la lastaj diris, ke ili ne vidis la raneton.



9 Dank' al helpo de onklo Strigo, la kampomusa truo estis malfermita, kaj la kampomuso estis kaptita. La rano elkondukis sian frateton.



10 La rano-frateto malsaniĝis kaj suferis de favo. Najbaroj alvenis por vidi lin, kaj D-ro Pego diras: "Tio rezultigis de malpureco."



11 La rano-frateto resaniĝis, sed sur lia korpo restis cikatroj. Li tamen ne deprimiĝis kaj pli diligente sin ekzercis en kaptado de insektoj kaj baldaŭ fariĝis kapablulo en tio.



8152

